

✓ Esperanto

(1991)

✓ - 1947g/60

Bulgara Esperantisto

Aprilo 1991



ENHAVO

- 3 Centjara jubileo de Julio Baghy (M.Boulton)
- 5 La etna konsisto de Bjalistoko meze de la 19-a jc.
(Bernard Golden)
- 7 Pri la traduko de belëtro (M.Malovec)
- 11 La delikata spiralo (J.Radičkov, trad. D.Ĥaĝiev)
- 15 Originala verkaro (J.Modest)
- 18 Lazaro Ludoviko Zamenhof (G.Waringhien)
- 21 Junulara E-agado en Orient-Eŭropo (A.Kunzli)

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Evgeni GEORGIEV kaj Rumjana GEORGIEVA
Redakcia konsilantaro: Dimităr ĤAĜIEV, Kiril VELKOV,
Krăstju KARUCIN, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: "Ĥristo Botev" 97, 1303 Sofio - Bulgario,
tel. 22-80-86

Ŝtata presejo "Georgi Dimitrov" - bul. "Lenin" 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuajojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario "Bulgara Esperantisto" estas abonebla per la poŝto kontraŭ 9.60 lv. Por aliaj landoj - pere de naciaj poŝtoj kaj UEA (kodo: prsp-r) aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 ned. gld. aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por eksterlando pagita ĉe la redakcio de "BE" estas 25 lv. Prezo de unuopa ekzemplero - 1.00 lv. aŭ 3 ned. gld.

"Bulgara Esperantisto" kaj "Panorama Esperanto" tutjare estas aboneblaj ĉe firmao "Pres-Esperanto". Jarabono por 1991 de "BE" estas 12.00 lv. kaj de "PE" - 7.20 lv.

REKLAMTARIFO

1 paĝo	1/2 paĝo	1/4 paĝo	1/8 paĝo
712 lv.	356 lv.	178 lv.	89 lv.
990 gld.	495 gld.	247 gld.	123 gld.

La Redakcio de "BE" aperigas reklamojn en diversaj lingvoj ofertitajn de bulgaraj aŭ eksterlandaj entreprenoj, organizoj aŭ privataj personoj. Makleraĵo por havigo de reklamoj 20%. Movada rabato 50%. Ekstera kovrilpaĝo kostas 50% pli. Rabato por tuja ripeto 20%.

"Bulgara Esperantisto" havas abonantojn en 57 landoj.

Represo el "BE" permesata, indiko de la fonto bezonata.

Estas organizita regula surbendigo de "Bulgara Esperantisto" por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: La fruktarboj floras printempe...

Foto: Kirilka SAVOVA

BELGIO

Flandra Esperanto-Ligo,
Frankrijklei 140, B-2000
ANTWERPEN

BRAZILIO

Brazila Esperanto-Ligo,
Caixa Postal 11-1105,
70084-BRAZILIA-DF

BRITIO

Paul Hewitt, 26 Highfield
Road, North Thoresby, Great
Grimsby, SOUTH
HUMBERSIDE DN36 5RT

FRANCIO

Federation Esperantiste du
Travail, 115, Rue Beranger,
F-92320 CHATILLON

Union Francaise Pour
L'Esperanto, 4 Bis Rue de la
Cerisaie, F-75004 PARIS

HISPANIO

Jorge Morague Penella,
Pintor, D. de la 2, 46001
VALENCIA

IRLANDO

Esperanto-Asocio de
Irlando, 9 Templeogue Wood,
DUBLIN 6W

JAPANIO

Yoshiaki Mizuno, Hanazono
1-2418-18, TOKORAZAWA,
359

JUGOSLAVIO

Zoran Murgovski, ul. "Dame
Gruev" 65, YU-96000 OHRID

PORTUGALIO

Portugala
Esperanto-Asocio,
A.S.Almeida, R. Dr. Joao
Couto, 6, r/c.A., P-1500
LISBOA

SUD-AFRIKO

C.S.Beckford, P.O. Box.
1227, CAPE TOWN, 8000

USONO

Esperanto League for North
America, Inc. P.O.Box 1129,
EL CERRITO, CA, 94530

Jaro 60

N-ro 4

Bulgara Esperantisto

ORGANO DE BULGARA ESPERANTO-ASOCIO, FONDITA EN 1919

PRI LA ESTONTA E-AGADO

Ĝi vere dependas de la aktivado de ĉiuj - esperantistaj societoj, sekcioj, ordinaraj esperantistoj kaj ankaŭ de la laboro de salajrataj oficistoj en la diversaj sektoroj de BEA. Tio signifas, ke ni ĉiuj devas pensi kaj trovi la necesajn mekanismojn por aktivigi nian ĉiutagan laboron en la nomo de estonta E-agado. Tiu penso devas aktivigi nin ĉiujn por plenumo al diversaj iniciatoj.

Nature la aranĝoj povas esti diversaj kaj variaj. Tamen ĉefa tasko restas kaj estonte restos la malfermo de kursoj por instruado de Esperanto. Sen tiuj kursoj ne ekzistos Esperanto, ne funkcios E-movado, fariĝos ankaŭ nenecesa BEA (kaj pli ĝuste kun tiom da oficistoj). Pensante tiel ni venas al la demando, kia sistemo devas funkcii, kiu instigus la malfermon de E-kursoj. Ĉu en la konkreta organiza laboro ni ne povus pruntepreni iujn rimedojn formulitajn ekster la E-movado?

Ekzemple, kial ni ne orientiĝu al t.n. "materiala interesiteco"? Ĝi estas universala kaj povas esti aplikata ankaŭ ĉe malfermo de E-kursoj. Necesas, ke ni

akceptu ĝin kiel ion tute normalan. Tiel, kun decido de la Estraro, ĉiu kursorganizado ricevos iun sumon (ekzemple de 50 levoj) kaj poste je la fino de lernojaro la sama organizanto ricevos kroman sumon en procento laŭ la nombro de kursanoj sukcese finintaj la kurson. Ni povus atendi pli bonajn rezultojn en la kursa agado, se ni utiligus la grandan forton de la "materiala interesiteco".

Tia agmaniero povas esti organizita kiel konkurado inter la organizantoj ĉekape kun la E-societo. Se oni trovos, ke en la nunaj kondiĉoj la konkurado jam estas malnova formo sen estonteco, tia stimulado povas esti aplikata en unu organizita kampanjo por malfermo de kursoj. Simila kampanjo estas forte bezonata, por ke BEA atingu la membrojn en la kongresa 1990. Estas tempo por bona preparo de la kampanjo por la nova lernojaro 1991-1992. La aplikata stimulo nepre donos la atenditajn pozitivajn rezultojn, se tio estos forte ligita kun nemonopolisma principo, ke ĉiu rajtas organizi kursojn

laŭ propra programo per diversaj instruprogramoj kaj metodoj de instruado. La sendependa Scienca Esperantista Instituto konstatos la rezultojn kaj alcelos la Estraron al la ĝusta vojo.

Jam en la komenco ni devas kalkuli je ni mem, je niaj propraj fortoj kaj ĉiuj devas engaĝi sin al realigo de la plej aktuala kaj grandega tasko - malfermo de kursoj kaj produktado de esperantistoj. Ni konsciu, ke la rezultoj ne venos de si mem, sed per komunaj streboj de ĉiuj.

Helpe al ni estos la ekonomia agado, kiun laŭ la nova statuto povas organizi la E-societoj kaj aliaj unuoj de BEA. Laŭ la jam ekzistantaj dokumentoj mankas baroj por praktikado de simila agado. Tamen de unu flanko la societoj devas posedi estraranon, kiu konante bone la priskribojn de Dekreto pri la ekonomia agado n-ro 56 orientiĝos al varoj, kiuj estasprodukteblaj laŭ la fortoj de la societo mem. Estas grave, ke la

engaĝitaj specialistoj deziru honeste labori sub la nobla E-flago.

De alia flanko la Estraro de BEA devas plenumi la kongresan decidon, formulitan en ĉapitro V, punkto 5 de la Agadprogramo de 42-a Kongreso de BEA "ĉe la estraro estu fondita Konsilio de specialistoj pri financaj kaj ekonomiaj problemoj". Tiu helporgano estus reala apogilo por "plivastigi la reton de ekonomiaj entreprenoj ĉe societoj, kluboj k.a.", kiel antaŭvidas la sama Agadprogramo de la Kongreso. Tiu tasko duonjaron post la Kongreso restas malfermita. La Konsilio estas bezonata, ĉar ĝi starigos regulajn rilatojn kun la societoj, povos transporti sperton de unu loĝloko al alia. Tamen ni ne atendu la estontan Kongreson por alparoli (aŭ kritiki), sed ekde nun agu kaj laboru. Tiukaze ni povas esti certaj, ke la estonta E-agado estas en bonaj kaj certaj manoj. Do al laboro!

Dimitâr MUTUȘEV

DU CELEBROJ

La 30-an de januaro ĉi-jare en la granda salono de la Esperanto-domo de kulturo en Plovdiv kolektiĝis esperantistoj kaj neesperantistoj. Ili venis celebri la 90-jariĝon de elstara esperantisto, ĵurnalisto kaj pentristo Ivan Ŝivarov.

Danĉo Danev tralegis gratulleteron en la nomo de ĉiuj plovdivaj esperantistoj, poste estis tralegitaj biografiaj notoj pri la jubileulo. La prezidantoj de societo "Kulturo" kaj de E-Kulturdomo salutis kaj transdonis donace al li suvenirojn. Ŝivarov ricevis ankaŭ personajn salutojn. En la nomo de verkista kolektivo "Repin" en Plovdiv korajn salutojn kaj bondezirojn peris plovdiva poeto Atanas Ruskov.

Estis plenumita literatura-muzika programo, en kiu enestis verkoj de Ivan Ŝivarov.

Fine la jubileulo emocie dankis al ĉiuj ĉeestantoj kaj rakontis rememorojn el sia multjara

riĉa kaj fruktodona Esperanto-agado.

* * *

La 13-an de februaro k.j. en la sama domo kolektiĝis esperantistoj el la urbaj societoj. Ili festis 90-jariĝon de la unua E-klubo en Plovdiv - "Stelo". Prelegis Veselina Kurteva. Fani Miĥajlova recitis la poemon "Jubileo de Stelo" de Danĉo Danev. Dediĉe al la jubileo prezidantoj de urbaj societoj rakontis pri historiaj momentoj de ties agado. Ĉeestis ankaŭ Atanas Gaev kaj Jordan Paĉeliev el Asenovgrad. Gaev rememorigis pri la amikaj rilatoj inter asenovgradaj kaj plovdivaj esperantistoj. Veteranino Stojanka Maĝunova, esperantistino de 1924, rakontis siajn rememorojn.

Vladimir JELEV

CENTJARA JUBILEO DE JULIO BAGHY

Por multaj seriozaj esperantistoj de mia generacio, kaj verŝajne eĉ pli por la antaŭa generacio, Kalocsay kaj Baghy estis la du grandaj steloj post la polusa stelo Zamenhof: du grandaj fontoj de ne-elĉerpebla krea energio, kiuj, amike-kune sed malsam-maniere, brile montris la elastajn eblecojn de Esperanto kiel lingvo por literaturo komparebla, sen absurdeco, kun nacilingvaj verkoj. Por ni nun maljunaj, ili akiris kvaliton kvazaŭ legendan; kaj ili ambaŭ havis karakterojn simpatiajn, sed ankaŭ iom special-skalajn: mi diru, neadekvate, tre realajn, sincerajn personojn, kiuj tamen iom priaktoris sin mem, kontentigante la atendojn de aliaj. Por ni ili restas neforgeseblaj. Sed sekvantaj generacioj estas nun benataj, se legemaj, en multe pli vasta kaj koiornuancita maro de literaturo, kaj por ili la nomoj de Kalocsay kaj Baghy eble havas ian tavoleton de polvo;

temas pri mortintoj, pri pasinteco.

Cent jarojn post la naskiĝo de Julio Baghy, eble valoras do iom memorigi aŭ informi pri liaj atingoj. Li naskiĝis la 13-an de januaro 1891, al destino plejparte prema kaj blokanta, spite kiun, li postlasis, kiam li mortis la 18-an de marto 1967, verkaron unikan, larĝan kaj daŭre valoran. Lia volume presita verkaro konsistas el: kvin romanoj (**Viktimoj, Hural, Sur sanga tero, Paulo Paal (en Verdaĵ Donkiĥotoj), La verda koro**; kvin poemaroj (**Preter la vivo, Pilgrimo, La vagabondo kantas, Ĉielarko, Aŭtuna foliaro**); multaj noveloj (**Dancu, marionetoj!, Printempo en la aŭtuno, Koloroj**); unu vere grandskala poezia dramo triakta (**Songe sub pomarbo**) kaj multaj unuaktaĵoj (postmorte kolektitaj en **En maskobalo**, verŝajne ne definitiva);

aŭtobiografia verketo (**La teatra korbo**), miksa volumo (**Migranta plumo**). Li verkis ankaŭ detalan lernolibron por hungaroj kaj gramatikan katekismaron **Metodiko-Demandaro**. La supra listo ne estas finkompleta.

Tiun ĉi verkaron Baghy kreis en cirkonstancoj preskaŭ konstante malfavoraj. Promesplena junulo, kiu jam studis la aktoran arton, verkis opereton (prezentitan) kaj diversajn hungarlingvajn verketojn (eldonitajn), juna edzo kaj patro, li devis soldatiĝi, 24-jara, baldaŭ iĝis militkaptito kaj suferadis en diversaj siberiaj militkaptitejoj dum kvin jaroj. Post tiuj travivaĵoj li neniam plu bonfartis, lia persona vivo estis frakasita, kaj baldaŭ cirkonstancoj detruis ankaŭ lian karieron. Ĉiam pli-malpli malsana, ĉiam malriĉa, vivante per neindaj postenoj aŭ nesufiĉa pensio, sen taŭga verkista laborejo, dum multaj

jaroj endanĝerigita per suspektemo de dekstraj aŭ maldekstraj totalismoj, li servadis Esperanton per verkado kaj ankaŭ per instruado, organizaj taskoj, reĝisoraj kaj aktoraj laboroj k.a.

Du el liaj verkoj, **La verda koro** kaj **La vagabondo kantas**, speciale celas komencantojn. Sed mi ofte rekomendas ĉiujn liajn verkojn al postkomencantoj, por alkitimigi ilin al bonaj esprimrimedoj. Baghy ĉiam konsideris siajn legantojn. Lia stilo estas tre zamenhofa, senafekta, tuj komprenebla, sed samtempe li multe larĝigis la esprimivojn de Esperanto, precipe per dialogoj naturecaj, kredeblaj. Nu, multaj el liaj esprimrimedoj nun ŝajnas memevidente facilaj, sed estis li, kiu trovis ilin. Kredeble liaj verkoj ĉiam restos modeloj de lingvaĵo norma, sana kaj internacia. (Li ĉiam memoris, ke Esperanto celas ne nur eŭrop-lingvanojn, sed ankaŭ azianojn kaj afrikanojn.)

Sed oni ne legas la verkojn de Baghy kiel gramatikajn ekzercojn; liaj poemoj estas amuzaj aŭ kortuŝaj, plenaj de vivoveraĵoj; liaj romanoj temas pri fortaj situacioj, dramoplenaj emocioj; liaj

dramoj, kies temoj riĉe varias, spegulas liajn aktorajn spertojn, estante tre paroleblaj, prezentebaj, atentotenaj.

Liaj verkoj longe vivos. Vastaj aliaj servoj jam forgesiĝas, neeviteble: lia instruado en pluraj landoj, elpensado de pedagogiaj rimedoj, laboroj en la nacia asocio, en UEA, en la Akademio, helpa korespondado, taskoj rilataj al la Esperanta teatro. Pereis jam, kaj pereos plu per la sinsekvaj mortoj de ni, kiuj konis lin persone, memoroj pri la trezoroj de lia amikeco, lia amemo kaj kompatemo, liaj multaj grandanimaj pardonoj, la ofte mirinda pacienco de iu temperamente malpacienca, lia spontanea karesemo, ankaŭ lia stimula konversacio tiel plena de ideoj, anekdotoj, spritaĵoj, humuro - kaj korvarmeco, intereso pri la alia persono. Ne plu eblas kun plena signifo rekomendi la personan ekzemplon de Baghy, sed mi daŭre rekomendas al ĉiuj liajn verkojn.

Kaj mi mencias unu verketon lian, kiun mi iam elfosis en biblioteko: lian

Publika letero pri la reorganizo (t.e. de la neŭtrala internacia Movado, precipe de UEA kaj la tiama Internacia Centra Komitato), 1931, en kiŭ Baghy detale klarigas siajn principojn pri la Movado, plus diversaj praktikaj ideoj. Tiu ĉi polvokovrita libreto estas nun ja eksdata, sed ĝi restas modelo por diskutado kaj eĉ kritikado pri movadaj aferoj. Meze de tiom da plorige arogantaj, malafablaj, malamon semantaj polemikaĵoj, ofte venenitaj per senproportia singravigemo, pri lingvo kaj movado, kiuj "promesas sanktan harmonion" Baghy realisme kritikis, esploris mankojn, faris proprajn proponojn - sed konstante restis ĝentila, modesta kaj (malgraŭ riĉa kolervortaro, kiun mi foje aŭdis private!) evitis ĉian superfluan sarkasmon kaj ĉian personan atakon. Se nur ĉiuj el ni...!

Traleĝi liajn verkojn estas trempiĝi en honestaj kaj humanaj valoroj, foje ridi sen malico aŭ cinikismo, kaj samtempe inokuliĝi per fidindaj stilaj kutimoj. Ni ŝatunian trezoron.

Marjorie BOULTON
(El "La Brita Esperantisto")

La etna konsisto de Bjalistoko meze de 19-a jc.

Bernard GOLDEN

(Daŭrigo el n-ro 3/1991)

9. La ukrainoj aŭ rutenoj

La prahejmo de la ukrainoj/rutenoj estis en la parto de Pollando konata kiel Orienta Galicio kaj inkludis Volhinion kaj Podolion. Ilia lingvo, konata ankaŭ kiel la malgrandrusa, estas parenca al la rusa kaj belorusa lingvoj (Baedeker, 1912:xliv). Gold (1980:302) kritikas aserton de la usona lingvisto Jacob Ornstein, ke ukrainoj troviĝis en la naskiĝurbo de Zamenhof. Laŭ Gold, ne estis ukraina komunumo en Bjalistoko, kiam Zamenhof loĝis en la urbo. Li klarigas, ke la belorusa lingvo estis rigardata kiel variaĵo de la rusa, kaj la plejmulto de tiuj, kiujn Zamenhof estus nominta "parolantoj de la rusa lingvo" probable estis parolantoj de la belorusa. Nur en la pli altaj sociaj kaj ekonomiaj tavoloj troviĝis parolantoj de la rusa lingvo.

10. Tataroj aŭ mahometanoj

Maimon (1978:20) inkludas tatarojn en sia listo de etnaj grupoj en Bjalistoko. Zakrzewski (1913/1979:4, piednoto) uzas la terminon "mahometano". En la rusa imperio oni nomis tataroj de

tempo al tempo ĉiujn mahometanajn popolojn kaj ankaŭ ĉiujn parolantojn de lingvo apartenanta al la turkika branĉo. Ili laboris kiel komercistoj, kolportistoj, kelneroj kaj portistoj. Pro ilia sobereco, honesteco kaj fidindeco, oni kutime dungis ilin kiel dommastrumantojn kaj gardistojn. Kelkaj akiris pli altajn oficojn kiel funkciuloj, oficistoj kaj ankaŭ armeaj oficiroj (Baedeker, 1912:xliv; Schlesinger, 1909:469). Povas esti, ke parto de la grupo de tataroj/mahometanoj en Bjalistoko servis kiel militistoj en la garnizono.

11. La mankhava historia esplorado de Edmond Privat

La unua biografio pri d-ro Zamenhof estis verkita de la svisa esperantisto Edmond Privat (1920/1967). Privat estis speciale kvalifikita pritrakti la etnan situacion en la centra kaj orienta Eŭropo, ĉar ekde 1915 li fariĝis kunlaboranto de ĵurnaloj en Parizo kaj Genevo, kiuj komisiis al li la verkadon de serio da artikoloj pri naciaj minoritatoj kaj iliaj sentoj kaj esperoj pri politika sendependeco (Privat, 1963:59 k. sekv.). Estante

civitano de lando, kiu estis neŭtrala dum la unua mondmilito, la juna ĵurnalisto povis facile vojaĝi al ĉiuj landoj. Li vizitis d-ro Zamenhof la unuan fojon en 1915 kaj ankoraŭfoje en decembro 1916, kvar monatojn antaŭ la morto de la aŭtoro de Esperanto. Poste Privat havis kontaktojn kun membroj de la familio. En 1918 Privat komencis okupiĝi samtempe pri du gravaj libroj: la unua, en la franca lingvo, temis pri la historio de polaj ribeloj meze de la 19-a jc.; la alia, en Esperanto, estis lia biografio pri Zamenhof. Tuj post la fino de la unua mondmilito, Privat iris al Varsovio por la kvina fojo kaj vizitis la vidvinon de d-ro Zamenhof. Lia restado en la pola ĉefurbo estis fruktodona, kaj li reportis al Genevo valorajn dokumentojn por verki siajn du librojn.

Malgraŭ tiuj unikaj okazoj, kiujn Privat havis por surloke informiĝi detale pri la etna konsisto de Bjalistoko dum la knabaĝaj jaroj de Zamenhof, en la biografio li ne registras pli precizajn donitaĵojn, sed simple ripetas la nomojn de la kvar etnaj grupoj, pri kiuj Zamenhof skribis en sia letero al Borovko, kaj aldone mencias la litovan kaj blankrutenan

lingvojn. Pri neniuj etnoj li donas la nombron aŭ la procentojn kun rilato al la tuta loĝantaro de la urbo. Kvardek jarojn post publikigo de sia *Vivo de Zamenhof*, Privat (1960:27) verkis mallongan biografian skizon pri Zamenhof kaj priskribis la loĝantaron de Bjalistoko en iom modifita maniero laŭ okupo, riĉeco kaj lingvo: rusoj, poloj, litovoj, blankrutenoj kaj hebrea. Rimarkinda estas ellaso de la germanoj!

12. La graveco de la etna konsisto de Bjalistoko por la historio de Esperanto

Povas esti, ke Privat "forĝesis" kolekti pli abundajn dokumentitajn faktojn pri la etna konsisto de Bjalistoko, ĉar li subtaksis ilian gravecon, sed tio estas apenaŭ apogebla vidpunkto. Restas la demando, kiel pravigi provojn kolekti tiujn donitaĵojn nun, pli ol unu kaj kvaronjarcenton poste? Zamenhof loĝis en Bjalistoko dum la dekkvar-jara periodo de 1859 ĝis 1873 (Jossinet, 1960:13). Plurfoje li mem klarigis, ke ĝuste la interetnaj konfliktoj en lia naskiĝurbo profunde efikis sur lian spiriton kaj instigis lin al pensado pri universala lingvo por unuigi la homaron kaj forigi malsamajn gentoj, rasoj kaj religioj. Sekve, por povi prezenti plenan historian bildon de la ideologia fono de Esperanto, necesas akiri fidindajn donitaĵojn pri la etnoj en Bjalistoko kaj iliaj nombroj.

Krom la materialo verkita en Esperanto fare de adeptoj de la lingvo, sendube troviĝas amaso da valoraj donitaĵoj en dokumentoj kaj publikigaĵoj pritraktantaj historiajn, geografiajn kaj sociajn demandojn en la rusa imperio kaj Pollando dum la dua duono de la 19-a jc. Eblas, ke tiu materialo povas ĵeti pli da lumo sur la temon de tiu ĉi studaĵo, kiu evidente ne estas adekvate pritraktita en Esperantlingvaj verkoj nuntempe haveblaj. La esplorado de tiuj ne-Esperantaj

fontoj devas inkludi trakribadon de libroj kaj periodaĵoj ne nur en la rusa kaj pola lingvoj, sed ankaŭ en la jida. Sendube la reserĉo estos fruktodona, nur se ĝi okazos plejparte surloke en bibliotekoj kaj arkivejoj en Pollando kaj Sovetunio.

13. Bibliografiaj referencoj

Karl BAEDEKER. *Russland nebst Teheran, Port Arthur, Peking. Handbuch für Reisende*. Leipzig: Verlag von Karl Baedeker; 1912. 570 pĝ.

Marjorie BOULTON. *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto*. La Laguna (Hispanio): J. Regulo; 1962. 265 pĝ.

P. CELIAUSKAS. Esperanto kaj litova lingvo. *Horizonto de Soveta Litovio*. 1985; 9: 19-25.

Kazimierz DOMOSLAWSKI. Por pli bone kompreni la formigon de Zamenhof: La fono historia kaj politika. *La Nica Literatura Revuo*. 1961; 7 (41): 161-163.

David L. GOLD. Towards a study of possible Yiddish and Hebrew Influence on Esperanto. Pĝ. 300-366 en: Istvan Szerdahelyi, red. *Miscellanea Interlinguistica*. Budapest: Tankonyvkiado; 1980. 513 pĝ.

Roland JOSSINET. Biografiaj informoj pri D-ro L.L. Zamenhof. Pĝ. 13-22 en: Ivo Lapenna, red. *Memorlibro*. Londono: Universala Esperanto-Asocio; 1960. 104 pĝ.

Ryszard KRASKO. Ludwik Zamenhof - Tworca Esperanto. *Studia i Materiały do dziejów miasta Białegostoku. Prace Białostockiego Towarzystwa Naukowego*. 1972; 3: 121-146. Rusa resumo: 146-147; angla resumo: 147.

Ryszard KRASKO. Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Pĝ. 11-43 en: W. Alter Lafera (= Walter Zelazny), red. *Zamenhof, Movado, Doktrino*. Varsovio: Pola Esperanto Asocio; 1983. 124 pĝ. Elpoligis: Andrzej

Zielinski.

N.Z. MAIMON. *La kaŝita vivo de Zamenhof*. Tokio: Japana Esperanto-Instituto; 1978. 214 pĝ.

Edmond PRIVAT. D-ro L.L. Zamenhof. Pĝ. 27-28 en: Ivo Lapenna, red. *Memorlibro*. Londono: Universala Esperanto-Asocio; 1960. 104 pĝ.

Edmond PRIVAT. *Aventuroj de pioniro*. La Laguna (Hispanio): Stafeto; 1963. 143 pĝ.

Edmond PRIVAT. *Vivo de Zamenhof*. Chorleywood, Rickmansworth, Herts. (Anglio): The Esperanto Publishing Co. Ltd.; 1967. Kvina eldono. 133 pĝ. (Unua eldono: 1920).

M.L. SCHLESINGER. *Land und Leute in Russland*. Berlin-Schöneberg: Langenscheidts Sachworterbücher; 1909. 539 pĝ.

Gaston WARINGHIEN. Zamenhof Lazaro Ludoviko. Pĝ. 23-26 en: Ivo Lapenna, red. *Memorlibro*. Londono: Universala Esperanto-Asocio; 1960. 104 pĝ.

Gaston WARINGHIEN. Unu komplikita historio. Pĝ. 23-32 en: 1887 kaj la sekvo... Antverpeno, La Laguna (Hispanio): TK-Stafeto; 1980. 293 pĝ.

Adam ZAKRZEWSKI. *Historio de Esperanto 1887-1912*. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio; 1979. 144 pĝ. Kun biografia skizo verkita de Andrzej Pettyn. (Fotorepreso de la unua eldono, 1913).

L.L. ZAMENHOF. Eltiro el privata letero al s-ro B (N-Borovko). Pĝ. 417-422 en: Joh. Dietterle, red. *Originala Verkaro*. Leipzig: Ferdinand Hirt; 1929. 604 pĝ.

Maria ZIOLKOWSKA. *Doktor Esperanto. Doktoro Esperanto*. Warszawa: Wiedza Powszechna; 1959. 331 pĝ. El la pola lingvo tradukis Isaj Dratwer.

Pri tradukado de beletro

Eminenta ĉeĥa verkisto Ivan Olbracht (1882-1952) atentigis junajn aŭtorojn pri la diferenco inter la frazoj: *sur arbo sidas birdo kaj kantas kaj sur pomarbo kaŭras pasero kaj trilas*. Ambaŭ frazoj esprimas la samon, sed la unua per vortoj nekonkretaj, ĝeneralaj, pro ofta uzado banalaj, dum la duan formas vortoj konkretaj, malmulte trivitaj, freŝaj. El la poezia vidpunkto la unua frazo estas malforta, la dua forta. Inter la du ekstretoj ekzistas vico de duonfortaj frazoj: *sur arbo kaŭras birdo kaj trilas, sur pomarbo sidas pasero kaj kantas*.

La fortecon de poezia bildigo eblas kreskigi ankaŭ per esprimiva esprimado, kiam anstataŭ neŭtrala vorto staras vorto emocia aŭ personiga: *sur la tablo flagretis lanterno - sur la tablo palpebrumis lanterno; li tiris monon el la onklo - li melkis (pumpis) monon el la onklo; li mortis - li forpasis, li foriris en la transan mondon - li kadavrigis, li forigis en inferon; stultulo - la kompatinda naivulo - tiu sinkompara azeno*. La esprimivaj vortgrupoj povas esti fortigitaj pozitive (avinjo) aŭ negative (maljunulinaĉo).

La tradukojn endanĝerigas malfortigo de poeziaj bildoj, ĉar ĝuste la tradukantoj tre tendencas uzadi vortojn neŭtralajn, ĝeneralajn, grizajn, kiujn ili plej bone konas kaj kiuj eksaltas en la cerbo kiel la unuaj. Por eviti tiun danĝeron la tradukanto devas ne kontentiĝi per la unua solvo, kiu aperis en lia kapo.

Kompreneble, plej gravas la demando, ĉu en la originalo estas uzita esprimo forta aŭ malforta, esprimiva aŭ neŭtrala. La aŭtoroj ofte

intence malfortigas bildon, por ke la sekva bildo impresu tiom pli forte; la beletra esprimado estas senĉesa ludo de kontrastoj. La tradukanto bezonas kompreni la kontrastojn kaj esprimi ilin en la traduko per disponeblaj rimedoj, kiuj povas tre diferencii de la rimedoj en la originala lingvo. La beletra stilo rakontas fakte ne per vortoj, sed per bildoj - la sama bildo povas esti pentrita per tre diferencaj vortoj: **petoli kaj diboĉi=deskui bridojn=deĉeniĝi= eljungiĝi** ktp. Traduki signifas trovi vortojn, kies sumo elvokos la bezonatan bildon.

Multaj ŝajne facile tradukeblaj vortoj troviĝis en frazeologia kliŝo, kiu donas al ili novan valoron. Ekzemple la ĉeĥa lingvo tre misuzas la adjektivon **bela**: *diru al mi ion belan, vi estas bela kanajlo, ni bele diboĉis, vi bele stumblis pro la ŝtono, ni falis en belan kaĉon* ktp. En Esperanto taŭgas aliaj epitetoj: *diru al mi ion plezuratan, vi estas kolosa kanajlo, ni grandioze diboĉis, vi danĝere stumblis pro la ŝtono, ni falis en teruran kaĉon* k.s. La ĉeĥa tro ŝatas ankaŭ la et-vortojn: *ligno glateta kaj blanketa, mi prenos kafeton kaj dormeton, ĉu la sinjorinetto deziras la cepeton kaj karoteton?* Tio estas tradukebla per diversaj manieroj, ekz.: *lignoj vitraglataj kaj laktoblankaj, nun mi prenos mian amatan kafon kaj poste mi dolĉe siestos, ĉu la moŝta sinjorino deziras tiun ĉi delikatan cepon kaj sanan ruĝan karoton?*

En la nacilingvaj tekstoj tre ofte figuras la verbo **esti**, verbo preskaŭ senenhava, fakte nur vataĵo, sed kiel malregula verbo kun multaj

unusilabaj formoj ĝi ne ĝenas tiom, kiom en Esperanto, kies formoj estas, estis, estos, estus, estu tre similas unu al la alia kaj kiel dusilabaj multe pli okulfrapas. Se ili akumuliĝas en unu loko, ili primitivigas la tekston, tial oni anstataŭigas ilin per pli trafaj verboj. Anstataŭ *ŝlosilo estas en seruro, en la gastejo estis multe da muziko, ĉe la rivero estis verda tapiŝo de herbo* eblas diri *ŝlosilo sidas en seruro, en la gastejo abundis la muziko, la gastejo plenis de muziko, ĉe la rivero verdis herba tapiŝo, la rivero sterniĝis verda tapiso de herbo* ktp. Simile ŝparindaj estas aliaj banaiaj verboj kiel **havi, voli, povi, diri, iri, vidi** k.s.

La aŭtoroj ŝatas karakterizi siajn heroojn per slanga aŭ dialekta lingvaĵo, kutime kun komika efekto. Tia lingvaĵo estas malfacile tradukebla, ĉar minacas trivialigo de la teksto. Interesan solvon mi trovis ĉe germana traduko de ĉeĥa dialekta parolo en libro de Bohumil Hrabal. Por kompari mi prezentos preskaŭ laŭvortajn tradukojn de la ĉeĥa originalo kaj de la germana traduko.

Laŭ la ĉeĥa originalo:

- *Onklo Joĵin, - mi vokis sur la sojlo, - venu internen.*

- *Kaj kiu vi estas? - diris onklo Pepin.*

- *Nu, mi estas via bofratino, belan bonvenon!*

- *Sakre, mi havas feliĉon, ke mi havas tiel pimpan bofratinon, sed kie estas Francin? - demandis la onklo kaj trudis sin en la kuirejon kaj en la ĉambron. - Ho, ĉi tie, kio okazas kun vi? Ĉu vi kuŝas? Nu, sakre, mi venis al vi je vizito, mi ne estos ĉi tie pli longe ol dekkvar tagojn. - Lasas vin ĉiuj saluti, nur Boĥalena, tiu jam estas post la morto, ia taĥoniero *metis al ŝi en ŝtipon pulvon, kaj ulino, kiam ŝi metis tion en la ŝparfornelon, ĉio eksplodis kaj vangofrapis la ulinon sur la buŝaĉo kaj ŝi ekskuiĝis kaj estis for.*

Laŭ la germana traduko:

Sur la domporda sojlo mi vokis lin bonvene: "Venu internen, onklo Pepin."

"Kiel ni estas parencaj?" - li volis ŝcii.

"Nu, mi estas via bofratino, koran bonvenon!"

"Sakre, mi havas feliĉon riĉiĝi je tia pimpa bofratino, sed kie estas Francin?" - palavis Pepin kaj rapidis seninvite en la kuirejon kaj ĉambron. "Ho, jen vi estas, he, kio okazas kun vi? Venis mi vizite, mi ne restos pli ol dekkvar tagojn, neniel timu. Ĉiuj lasas vin multfoje saluti, krom Boĥalena, ŝi havas jam morton post si, ajna taĥoniero injektis pulvon al ŝi en ŝtipon kaj ŝi, tiu ulino, enigis la aĵon en la ŝparfornelon, tiu saltis aeren, trafis ŝin en la vizaĝon kaj la ulino iomete skuiĝis kaj estis for..."

* **Taĥoniero** - slanga kriplaĵo de kanoniero

Miroslav MALOVEC

ESPERANTO HELPE AL HOMOJ

Neniam Esperanto estas izolita de la homa vivo kaj de la bezonoj de esperantistoj. Tamen iuj iniciatoj aperas kaj poste tre rapide forpasas en la historio. Inter la lastaj eble estas la Esperanto-Centro Humanismo, kiun strebas restarigi filozofo Roland Hegen (Schlossgasse 30, D-W-6738 Elmstein, Germanio). Li kiel meminstruita filozofo, en la vivo, trovis la ĝustan vojon al humanismo. Laŭ li la humanismo ankaŭ estas mondkoncepto, tamen egalvalida por ĉiuj ceteraj, ĉar "ekzistas nur unu humaneco".

Siajn esplorojn Roland Hegen skizas en la verko "De kredo al scio". En ĝi oni traktas la

problemon - ĉu batalo por ekzistado aŭ solidareco. La iniciatinto pensas restarigi la eldonon de malgrandaj kajeroj, kiuj servos kiel "humanisma biblioteko".

La humanismo ne estas io memkomprenebla, kiu venas kun la naskiĝo de la homoj. Ni ĉiuj devas batali por humanisma mondkoncepto, por ke ni ĉiuj estu humanistoj. Por ni esperantistoj tio estas pli facila, ĉar Esperanto helpas nin tiudirekte. La interesitoj povus skribi al: **KEK, PK 25, 1309 Sofio**, kaj esprimi sian opinion kaj ion proponi.

Dimitâr MUTUŖEV

REZULTOJ

DE LA ENKETO DE "BE"

Ĝis la limdato 31-a de marto j.k. en la Redakcion alvenis 8 leteroj de bulgaraj legantoj: **Ĥrsto Tonev**, **Cvjatko Todorov** kaj **Ivan Smokov** el **Ŝumen**, **Stefan Aleksandrov** el v. **Kâŝin** (Loveĉ-regiono), **Stojan Velikov** kaj **Evdokia Ĉoĉeva** el **Varna**, **Ivan Ivanov** kaj **Stefan Sokolov** el **Sofio**. Malgraŭ la tre granda nombro de alilandaj legantoj, ni ne ricevis iliajn respondojn (eble pro malfruiĝo de la revuo dum ĝia presado). Jen estas la opinioj:

Plej ŝatataj estas la artikoloj de **Violin Oljanov** sub titolo "Problemoj de la bulgara E-movado" (n-roj 10, 11, 12/90 kaj 1/91), "Lingvaj demandoj", **Celebro de Eroŝenko** (11) kaj **Rememoroj pri V. Eroŝenko** de **T.Sasaki** (5), **Humuro naskita inter la homoj** kaj **rakonto de Ĉudomir "Konstanta delegito"**. Al la demando pri malplaĉa artikolo preskaŭ ĉiuj respondas, ke tiaj mankas, sed multaj malkontentas pri la malfruiĝo de la revuaj kajeroj kaj respektive la "maljuniĝo" de la artikoloj, kiuj priskribas eventojn okazintajn antaŭ 3-4 monatoj.

Se oni estus redaktoro, oni donus preferon al jenaj temoj: organizaj, E-movado en- kaj eksterlande (**Ĥr. Tonev**, **St. Sokolov**); pri slavismo en Esperanto (**E. Ĉoĉeva**), decidoj de la Komitato de UEA kaj ties sciigoj (**St. Velikov**). Tamen ĉiuj estas unuanimaj pri la prefero al lingvaj demandoj, ĉar ĉiuj strebas al perfektigo de sia E-lingvokono.

Ĉiuj respondas, ke la artikoloj estas utilaj kaj

interesaj. **Cv. Todorov** rekomendas, ke ne estu publikigitaj tre longaj materialoj (2-3-paĝaj) kaj **St. Velikov** opinias, ke okazintaj antaŭ pli ol unu monato eventoj estas superflujaj kaj ne prezentas intereson.

Al la demando pri malfacilaĵoj ĉe la legado de "BE" ĉiuj respondas malaprobe. Nur **I. Ivanov** mencias, ke iujn partojn de la artikoloj de **Hektor Alos i Font**, li ne sufiĉe bone komprenas.

Plej preferataj rubrikoj estas "Nia intervjuo", "El nia leterkesto", "Enlanda movado", "Distroj" (**Cv. Todorov**, **Ĥr. Tonev**). Laŭ **St. Sokolov** kaj **St. Aleksandrov** ĉio proponita estas interesa, **E. Ĉoĉeva** preferas "Belarto-n", "Interlingvistiko-n kaj esperantologio-n", sed ĉiuj atente sekvas la rubrikon "Lingvaj demandoj".

Ĝojiga estas la fakto, ke ĉiuj legas la revuon ankaŭ en siaj klubejoj, pruntedonas ĝin al aliaj samideanoj. **St. Velikov** ekspedas la kajerojn al siaj eksterlandaj geamikoj en 6 landoj kaj interŝanĝas opiniojn pri la publikigitaj artikoloj.

La plimulto el la respondintoj respondas, ke ĉiam kaj ĉie konvinkas siajn konatojn aboni "BE".

Kiel ni promesis, tri personoj el la respondintoj ricevos E-librojn.

Ni lotumis la nomojn de gajnintoj: **E. Ĉoĉeva** ricevos "*Bonvolu, je via dispono*" de **R. Ralin**, **St. Velikov** - "*Ruza-n Petro-n*" de **S. Popov** kaj **Ivan Ivanov** - "*Anekdotoj-n el Gabrovo*".

La Red.

UNIKA FENOMENO



Jordan Radičkov naskiĝis la 24-an de oktobro 1929 en vilaĝo Kalimanica, departemento de Miĥajlovgrad. Li finis gimnazion en Ĥ. Berkovica. Li laboris kiel ĵurnalisto kaj redaktoro ĉe diversaj gazetoj kaj kiel redaktoro ĉe la scenara komisiono de Bulgara kinematografio.

Radičkov estas verkisto, kiu tre rapide manifestis sian originalecon kaj jam pli ol tri jardekojn retenas la atenton kiel unika fenomeno en la nuntempa bulgara literaturo. Li apartenas al unu nuntempa generacio de kamparaj verkistoj, kiu, naskiĝinta en la kamparo kaj heredinta multon spiritan de gepatroj kaj geavoj, de proksimuloj kaj najbaroj en la komuna genta famileco de la vilaĝo, eniris la urbon kaj kunpuŝiĝis kun la novaĵo

kaj la neatenditaĵo, kun la scienca kaj teknika progreso.

Lia produktiveco estas nekredeble granda. Li estas aŭtoro de ĉ. 40 libroj. Lia produktiveco venas el la soifo rakonti kaj el la neelĉerpebleco de la mondo, troviĝanta en lia fantazio. La ĝenraj formoj de lia verkaro estas variaj: rakontoj, noveloj, romanoj, dramoj, filmscenaroj, vojaĝpriskriboj. Liaj verkoj estas tradukitaj en pli ol 20 fremdajn lingvojn kaj eldonitajn en 50 eksterlandaj eldonoj. Multaj liaj verkoj estas reeldonitaj.

En sia verkaro Radičkov demonstras sian filozofion. En la elpensita de la aŭtoro realo estas protektata severa morala ordo, liaj herooj pretas pagi ĉiupreze la plej altan idealon, kiu por li havas ne la materiajn, sed spiritajn mezurojn, kiu estas la libereco. Temas pri la interna libereco.

Kiel la kamparano krom siaj samvilaĝanoj Radičkov konas tre bone la konduton de la besto. En la besto li malkovras krom la nehomogenaj karakteroj, malsama percepto kaj malsama spirita etoso, ankaŭ "nature" pritakson pri la mondo. Besto en liaj rakontoj estas "pagano". Ĝi postulas tion, kion postulas ankaŭ liaj instinktoj kaj tie ĉi estas ĝia supereco. Radičkov estas kritika psikologo de la civiliziteco. Idealigante la primitivon, li eliras el ĝi kaj rakontas pri la alia, granda mondo, kiun tamen li pritaksas per la komplikeco, moralo kaj

rajto de la naturaĵo.

Al la natura mondo, kiu nutras la impresojn de la verkisto, aldoniĝas la fantastaj fortoj de la hejmo, la spiritoj, kiuj intervenas en la vivon de la kamparano kaj kiuj incitas ne religiajn, sed mitajn vivajn konceptojn.

En siaj vojaĝpriskriboj la verkisto vidas tion, kion la homoj de la priskribitaj landoj kaj lokoj ne vidis.

La verkoj de Radičkov estas penetritaj de humuro, kiu estas nuancita de lia delikata kaj kora rilato al la homo. La facileco de lia humuro atribuas al ĝi groteskajn-ironiajn notetojn. Multaj liaj rakontoj estas ilustritaj per liaj groteskaj pentraĵoj.

Radičkov ŝatas la anekdoton en la vivrilataro kaj granda parto de liaj rakontoj naskiĝis surbaze de la anekdoto.

La stilo de Radičkov ne havas antaŭajn premisojn en la bulgara literaturo. Radičkov pliriĉigis per subteksto la nuntempan prozan lingvaĵon. Lia lingvaĵo estas kiel eĥo de la popola parolo, pliriĉigita per moderna esprimiveco.

Radičkov ŝatas ĉasi kaj amas la bestojn. La rakonto "La delikata spiralo", kiu estas publikigita en tiu ĉi numero en la Esperanta traduko de Dimităr Haĝiev, havas ĉasistan objekton. Ĝi estas prenita el la samtitola rakontaro, kiu ricevis la premion por la jaro 1986 de Unuiĝo de Bulgaraj Verkistoj. Laŭ informo de la aŭtoro ĝi estas preskaŭ dokumenta.

Dimităr HAĜIEV

La delikata spiralo

Jordan RADIČKOV

Iun malvarman vintran tagon mi veturis per ĉevala sledo tra Ludogorie. Do ni estis kelkaj homoj enpremitaj dense unu al la alia en la ligna kesto, iuj sidis vizaĝe al la ĉevaloj, aliaj dorse, triaj estis sidiĝintaj flanke, ĉiuj ni estis frostiĝintaj, malvigliĝintaj kaj lacaj. Ni estis revenantaj de ĉasado, ĉirkaŭvolvitaj per ŝaloj, kun levitaj kolumoj, kun ĝisfunde surmetitaj ĉapoj aŭ kapuĉoj, tiel ke eĉ ne unu vizaĝo estis videbla tute. Elsub la kapuĉoj kaj la ŝaloj fumis vaporo pro la spirado de la homoj, vaporo fumis ankaŭ el la naztruoj de la ĉevaloj. Kiam oni veturas per sledo, oni malvarmiĝas rapide, malvarmo trakuras tra la tuta korpo, la okuloj komencas larmi, la tuta naturo komencas ŝajni nalamika. La ĉielo super ni estis griza, maldekstre de la sledo grizis arbaro, de nia dekstra flanko etendiĝis la ebenaĵo, iom dekliva, kovrita de neĝo.

La vojo serpentumis preter la arbaro mem, malsupreniĝis en iun valeton, grimpis, en iuj lokoj la sledo joris, la glitiloj gratis sur gruzo kaj ŝtonoj, la ĉevaloj komencis nazbrui, la koĉero ŝvingis la vipon en la aero kaj komencis krii: "Hot! Hot!" La blanka ebenaĵo ete fortiĝis kaj ektorniĝis preter ni, la silentiĝinta arbaro eliĝis piedfingre malantaŭen, la plej proksimaj apud la vojo arboj ekkuris rapide, la malpli proksimaj moviĝis malpli rapide kaj kreiĝis la iluzio, ke la arbaro kuras per miloj da piedoj, sen la arboj surtreti unu la alian.

Preter iu el la meandroj subite elkreskis sur la neĝo sovaĝroza arbusto, supersutita de brilaj ruĝaj fruktoj. Ĝi estis turnita samtempe en ĉiuj direktoj. La koĉero diris: "Nu vidu!", li ekŝvingis la vipon kaj frapegis la arbuston tra la vizaĝo.

La sovaĝroza arbusto ektemis, ektemis kune kun ĝi ankaŭ la glaceaj ruĝaj fruktoj, ili

ekludis kiel vivaj okuloj, kvazaŭ estus frapita ne frostiĝinta arbusto, sed viva estaĵo per la vipo tra la vizaĝo. La glitiloj de la sledo daŭre grincetis egalritme sur la neĝvoĵeto, monotone sonoris kaj kankompanis ilin la ĉevalaj sonoriletoj, la sovaĝroza arbusto malrapide fortiĝis malantaŭen, fiksinta en nin siajn centojn da ruĝaj okuloj. La vojo deklivis ete, la ĉevaloj komencis nazbrui, mi turnis min antaŭen, vidis la ŝultrojn, la dorsojn, la kapuĉojn kaj la blujajn okulojn de unu el la ĉasistoj. Li estis ekmordinta delonge estingiĝintan cigaredon. "Tio ĉi devas esti iu vampiro" - diris al mi la ĉasisto. "Kion?" - demandis raŭka voĉo el la antaŭaĵo de la sledo. "Tiu arbusto" - diris la homo, kun la estingiĝinta cigaredo kaj turnis kapon malantaŭen tra sia ŝultro, por montri la sovaĝrozan arbuston. Mi vidis, ke sur lia vizaĝo pentriĝis perplekseco.

Mi ekrigardis malantaŭen, la sovaĝroza arbusto ne plu videblis. Blankis nur la ebenaĵo, apud ĝi staris rekta la griza arbaro, de supre grizis la ĉielo. Ni malsupreniĝis en iun valeton, la valetto kaŝis la sledon disde la fiksrigardantaj okuloj de la sovaĝroza arbusto.

"Preskaŭ kiel homo... preskaŭ kiel homo!" - akra penso pikis min. Mi plu sidis, turnita malantaŭen, post mia dorso mi aŭdis la ĉevalajn sonoriletojn, tuson, ies murmuradon, la knaron de la leda rajdekipaĵo. Altrudiĝema rememoro ekkuris laŭ la neĝvoĵeto post la sledo, apud ĝi senbrue, sen stubli, kuris la milpieda arbaro, homo kun trikita ĉapelo kaj kun barbo kuretis, videblis klare liaj alta frunto kaj fiksita, preskaŭ fanatika rigardo. Antaŭ li turniĝis kaj ruliĝis tra la neĝo la sovaĝroza arbusto, skurĝita kvazaŭ per nevidebla vipo, rigardanta samtiel streĉite per siaj centoj da

ruĝaj glaceaj okuloj sian persekutanton. Pormomente haltis kaj la arbusto, kaj la persekutanto, mi vidis kiel la homo ekgratis al si la barbon kaj ĉirkaŭrigardis tiel la arbuston, kvazaŭ li serĉus ion kaŝitan en ĝi.

La homo kun la guculu ĉapelo estis Metodi Andonov.

Jen jam kvin jarojn li ne estas inter la vivantoj, sed ofte okazos, ke mia fantazio plej vigle pentros lin tiel viva kaj aŭtentika, ke se mi elvokus, mi estas certa, ke mi ekaŭdus lian voĉon. Tamen eĉ ne unu fojon mi ekpensis alvoki lin, mi sentis ian timon, mi timas, ke se mi ekaŭdus lian voĉon kaj ekvidus kiel responde al mia alvoko li ekiras kontraŭ min, mia koro apenaŭ eltenus. Kiam li vivis, foje ni iris en la montaron Ruj por ĉasado de grandaj ĉasbestoj. Denove estis vintro, ni ĉasis en la arbaro, silentiĝinta kaj negastama, la ĉielo estis disŝirita, jen suno superŝutis la arbaron, jen ombro kuretis tra ĝi, pafado eĥis el iu embusko, per murmurado al la pafado respondis la ravinoj. Fine de la ĉasado Metodi alvokis min, ni estis najbaroj laŭ la embuskejoj. Mi vidis lin ĉirkaŭanta kaj embuskanta ĉirkaŭ iu sovaĝroza arbusto kaj tiel fiksrigardanta ĝin, kvazaŭ ene estus kaŝita bestio. "Venu, venu!" - li diris mallaŭte. Mi demandis lin kio estas. "Vidu!" - li diris al mi, montrante la arbuston per fingro. Lia tuta vizaĝo radiis, al mi ekŝajnis, ke io fanatika estas en lia rigardo. Mi atente ĉirkaŭrigardis la sovaĝrozan arbuston.

Tiu ĉi arbusto, alta kiel homstature, situanta larĝe sur la neĝo, la tuta superŝutita per brilantaj ruĝaj fruktoj. "Venu vidi de la alia flanko!" - al mi diris Metodi Andonov kaj ambau ni transiris al la alia flanko, sed de la alia flanko estis la samo. "De kie ajn ni ekstarus, ĝi ĉiam rigardus nin!" - min atentigis Metodi Andonov. Mi ekbruligis cigaredon kaj lasis la homon plu ĉirkaŭiri kaj embuski ĉirkaŭ la sovaĝroza arbusto. Kelkfoje li ĵetis al ĝi neĝbulojn, la arbusto ektremis, ektremis ĝiaj centoj da ruĝaj fruktoj kaj, se oni helpe elvokus sian fantazion, oni povus ekpensi, ke tiu ĉi sovaĝroza arbusto vere ektremetas kiel viva estaĵo kaj ĝiaj rabistosimilaj okuloj ekrigardas en ĉiuj direktoj. Metodi Andonov palpis de tempo al tempo sian griza-blankan guculan



Grafikaĵo: Penka PETKOVA

ĉapelon, ekgratis al si la barbon kun ia aparta nervozeco, preskaŭ kun volupto. En lia voĉo mi ekaŭdis patosajn notetojn. "Jen la teatro! - li vokis min. - Miraklo! Miraklo... ĉu vi imagas al vi tiun ĉi arbuston sur la scenejo, sed tute aŭtentikan, prenitan rekte de la arbaro, sovaĝan, frostiĝintan, superŝutitan per brilantaj fruktoj! Ĉu vi imagas al vi, la tuta scenejo estas pure blanka, virga, kiel la neĝo ĉirkaŭe, kaj ni surverŝas ĝin per lumo, ni lasas ombrojn trakureti tra ĝi, ni ĉirkaŭvolvas per blanka nebulo parton de la arbusto, poste ni lasas la venton forbalaji ĝin... ho, kiel terure tio ĉi povus estiĝi!"

Li frapis al si la bruston entuziasmigite kaj denove fiksas sian fanatikan rigardon sur la kvietan, situantan trankvile meze de la neĝo arbuston. En tiu ĉi momento li aspektis kiel homo, kiu estis ĉesinta rigardi al la vivo kaj al la naturo ĉirkaŭ si kiel dekora kurteno, sed li penis trabori tiun ĉi kurtenon, disŝiri ĝin kaj enrigardi malantaŭ ĝi. Kredeble Metodi Andonov sukcesis enrigardi post ĝi, kvankam nur tra la observotruo kaj rimarki, probable, ion eksterordinare esencan kaj gravan, alimaniere kiel mi povas klarigi al mi, ke iu normala homo povas per tia fatala rigardo ĉirkaŭi la frostiĝintan sovaĝrozan arbuston?

Mi ne surpriziĝus, se en tiu ĉi momento li kolektus fortojn kaj saltus en la arbuston, al mi estas malfacile difini ĉu homo aŭ la sovaĝroza arbusto pli sovaĝe aspektis. Verŝajne ambaŭ ili estis egale sovaĝaj... Tiel mi memoros ilin tutan vivon kun fiksrigardoj unu al la alia, kaj mi ne komprenos kial tiel frue kaj haste al tiu ĉi barbohava knabo el vilaĝo Kaliŝte atencis la naturo, kiu estis ĉiam vigla, sed trankvila? Ĉu do al la naturo ne sufiĉas la sovaĝrozaj arbustoj, ke ĝi elradikis el niaj koroj ankaŭ tiun ĉi sovaĝrozan arbuston por ekpeli ĝin tra sia neĝa senhomejo?

... Mi ekaŭdis denove malantaŭ mia dorso la ĉevalajn sonoriletojn, tuson, homajn voĉojn. Mi ekrigardis la neĝvojeton malantaŭe - ĉio

estis dezerta. Fakte estis nenio, kion mi povas serĉi en tiu ĉi malvarma dezerto. Se mi volus trovi ion, mi devus denove traserĉi en mi mem. Al mi ne restis tempo por traserĉi, ĉar mi rimarkis kiel el la griza ĉielo ekaperis birdoj, kiuj iĝis ĉiam pli videblaj kaj pli videblaj, kvankam grizaj. La birdoj kreskis en grandan grizan birdaron, ili ŝvebis super la griza arbaro, sen aŭdigi eĉ sonon. "Sovaĝaj kolomboj!" - ekkriis la raŭka voĉo, kiu antaŭ nelonge estis demandinta la bluokululon kio estas vampiro.

Ĉiuj ekmoviĝis en la sledo, la bluokululo ŝargis sian pafilon, vokis al la koĉero haltigi la ĉevalojn, la ĉevalbridoj estis streĉitaj, ekaŭdiĝis kiel la ĉevaloj kolere per la dentoj ekmordis la ferajn bridojn. Iu diris, ke la sovaĝaj kolomboj estas ege alte kaj ke estas sence pafi, ĉar ne eblas per pafilo je tia alto trafi birdon. La bluokululo kriis: "Mi frapos!", la alia kontraŭdiris al li, ripetante la samajn vortojn: "Ne eblas trafi birdon!" La birdaro flugis trankvile kaj flue, la bluokululo celis trankvile en ĝin kaj flue movis la tubojn de sia pafilo. Kiam la birdoj eksiblis super ni kaj ĉiuj en la sledo ekaŭdis kiel potenca estas la svingo de iliaj flugiloj, la bluokululo pafis. Pro la pafo la birdaro momente leviĝis supren, nur unu birdo restis flanke, ekbalanciĝis, faris malgrandan cirklon, por kontroli kia estas tiu ĉi tondro direkte de la tero kaj kio povas okazi?

La sovaĝa kolombo ne povis kompreni nek kia estis tiu ĉi tondro direkte de la tero, nek kio estis okazinta, pro tio ĝi faris ankoraŭ unu cirklon, poste ankoraŭ unu, tiujn ĉi cirklojn ĝi pentris en la ĉielo spirale, ĉar, rondflugante, ĝi priatentis sekvi ankaŭ la direkton de la birdaro. Sed jen unu el ĝiaj flugiloj malplifortiĝis, ĝi ne svingis plu tiel forte per ĝi, la cirkloj iom post iom komencis malplilarĝiĝi, la birdo perdis alton, kvankam ĝi malproksimiĝus de ni, kaj en iu momento ĝi ĉesis svingi siajn flugilojn. Ĝi eksimilis grizan ĉifonon, ne povis teni sin en la aero kaj

ekflugis impete malsupren.

Neniu sono ekaŭdiĝis post la falo. La sovaĝa kolombo malaperis tiel subite en la neĝo, samkiel estis malaperinta ankaŭ la sovaĝroza arbusto antaŭnelonge.

Mi estis la plej juna en la grupo, pro tio mi eksaltis el la sledo kaj ekiris preni la kolombon. La neĝo estis profunda, en kelkaj lokoj ĝi atingis ĝis la genuoj. Nenie la postsekvo estis videbla, la blanka ebenaĵo etendiĝis antaŭ miaj okuloj pura kaj hela, sen ajna grataĵo kaj sen ajna polveto sur ĝi. Tio tamen ne daŭris longe. En iu loko mi vidis ruĝan guton, ĝi estis iom ege flanke de mi. Alproksimiĝinte, mi vidis duan guton, kiu estis ruĝanta apud ĝi, iom pli malproksime lumis tria. Mi haltis antaŭ tiuj ĉi gutoj en la neĝo. Ili viciĝis simile al spiralo, formis unu cirklon, poste en tiu ĉi cirklo enskribiĝis dua, delikata arko eliĝis el ĝi por pentri trian cirklon... Mi rigardis jen la ĉielon, jen la gutojn de sango sur la neĝo. Tio ĉi estis la sango de la kolombo. Dum la birdo estis rondfluganta supre kaj pentranta cirklojn kaj spiralojn en la ĉielo, ties sango je grandaj gutoj estis falanta malsupren sur la neĝon kaj estis desegnanta sur ĝi la samajn cirklojn kaj spiralojn. Mi ne kuraĝis plu alpaŝi en la neĝon, ia stranga sento detenis min jam ĉe la unua cirklo. Plue desegniĝis la ceteraj, konturitaj sur la virga dezerto.

El la sledo oni komencis voki kaj direkti min al la loko, kie la sovaĝa kolombo estis enbatinta sin kaj pereinta en la neĝo. Ankaŭ mi ekkriis, ke pluen ne eblas iri. La duono de la viroj elsaltis el la sledo kaj bruligante cigaredojn unu de la alia, amasiĝis en la neĝo por vidi kio estas tio, kio detenas min meze de la vojo. Kiam ili rimarkis la sangajn arkojn kaj cirklojn, desegnitajn tre delikate sur la neĝo, mi vidis, ke sur iliaj ĉirkaŭvolvitaj kaj kovritaj per kapuĉoj vizaĝoj estas pentrita surprizo. Nek spuro ajna, nek grataĵo estis observeblaj - ruĝis nur la delikataj sangarkoj, bildigitaj de la rondfluganta birdo. Impeta kaj eleganta estas la sovaĝa kolombo dum flugo.

Kiam la pafado el la sledo detenis ĝin kaj ĝi komencis rondflugi malrapide, malfruiĝante de la birdaro, neniu el ni suspektis, ke dum la birdo rondflugas, ĝi elpremas malrapide la sangon de si mem por finskribi per neklaraj cirkloj kaj spiraloj siajn lastajn legaĵojn kaj leterojn sur la blanka ebenaĵo, la lastan frazon de sia vivo.

Eble tiu ĉi frazo entenas malbenon; eble ĝi entenas ian testamenton al la aliaj birdoj kaj eble ĝi estis nur simpla postsigno de iu subita fino?

Ĉiukaze neniu kuraĝis alpaŝi antaŭen disŝiri aŭ surtreti la ruĝantajn delikatajn spiralojn de la birdo. Ni ĉiuj eksilentis, iĝis embarase stari meze de la blanka ebenaĵo, unu post la alia la viroj turnis dorsojn kaj sen iu el ni ekparolu, ni ekiris malantaŭen al la sledo. La ĉevalaj sonoriletoj eksonoris mallaŭte, la arbaro grizis malamike kontraŭ ni, la malaperinta sovaĝroza arbusto denove estis ekstarinta meze de la blanka kamparo, superŝutita de la brilanta ardaĵo de siaj fruktoj. Direkte de la sledo ĝi ne estis videbla, ĉar la sledo staris en la valetto, sed de tie ĉi ĝi klare reliefiĝis sur la blanka ebenaĵo, tiel ke ĉiu el ni povis vidi ĝin, kaj ankaŭ ĝi povis vidi nin per siaj fiksrigardantaj okuloj. Ni pasis unu post la alia silente inter la ruĝanta sovaĝa arbusto, fiksrigardanta nin per siaj centoj da ruĝaj okuloj kiel vampiro, kaj inter la delikataj arkoj kaj spiraloj, desegnitaj sur la neĝo far la falinta de la ĉielo kolombo.

"Hot!" - ekkriis laŭte la koĉero, kiam ĉiuj ni enpremiĝis en la sledon. Ekknaris la glitiloj sur la neĝvojeteto, egalritme eksonoris la ĉevalaj sonoriletoj kaj dum ni veturis, iom post iom mi eksentis, ke krom la sonoriletoj sonoras kaj eĥas mallaŭte ankaŭ io alia en mia animo, ia similaĵo de ĉiela larmo, de susuro de timkonfuzita sovaĝroza arbusto kaj ke mia animo komencas desegni kaj tordi neklarajn, sed delikatajn cirklojn kaj spiralojn.

Tradukis el la bulgara: Dimităr HAĜIEV

Julian MODEST

SUBITE ALVENAS LA FINO

*Subite alvenas la fino,
simile ekkrio en nokta trankvilo,
simile vulturo, signanta la plagon
per movo funebra de sia flugilo.*

*Subite alvenas la fino,
kaj restas du kisoj migdale amaraj,
du glasoj da vino duone malplenaj,
du sonĝoj sen finoj, sufoke koŝmaraj.*

*Subite alvenas la fino,
kaj orfas du paĝoj de lasta novelo.
Du steloj, similaj al etaj cejanoj,
ekkuris tra nokta arkana ĉielo.*

*Subite alvenas la fino.
En sento-muzeo duopas ni meze,
sed iu malice estingas la lumon
kaj vane ni serĉas eliron freneze.*

*Subite alvenas la fino.
La lastan brakumon ĉi tie ni lasas,
simila al tute malnova mantelo.
Ni iras trankvile - ja, ĉio forpasas ...*

Pisanica, la 24-an de aŭgusto 1990

AL P.

*Amike nin karesas la silento
kaj naĝas mi en viaj bluokuloj,
kaj ili time, lante sakramente
obsedas min benita varma sento.*

*Ĉu estis iam tiu jaro fora?
Printempis aŭ someris - mi ne scias?
Vi junis kaj lazuris via rido,
vi dolĉodoris je persiko flora.*

*Ni, kiel forgesitaj stacidomoj,
dum longaj jaroj vivis malproksime
kaj eble nur en la mirindaj sonĝoj
ni amkonfese flustris niajn nomojn.*

*La tempo kiel raba besto kuras.
Ekstere neĝas. Vi ridetas rare,
sed nun mi pli admiras vin, ĉar kiel
persiko dolĉaroma vi maturas.*

ĈU SOLAS MI?

*En kosma ŝipo mi freneze sagas
tra spackaoso de l' planedoj.
Al ili kiu, kiam min ekpafis
kaj kien mi solece vagas?*

*Neniu diras. Mankas la respondo.
La ŝipo hastas kiel fulmo,
senhalte tranĉas la glaciobskuron
al iu nekonata mondo.*

*Ekstere lupokule astroj lumas
kaj inter ili kugloj
sennombraj ŝipoj sendirekte flugas,
ĉu ies volon ili nun plenumas?*

*Ĉu solas mi en kosma oceano?
Verŝajne ie malproksime
indikas ĉiun mian feblan personon
sentiva televidekrano.*

Sofio, la 1-an de majo 1990

TRADUKA SEMINARIO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Fine de la pasinta jaro en aŭtokampadejo Obora apud la sudmoravia urbo Brno en Ĉeĥoslovakio okazis siminario pri tradukado TRASE '90 omaĝe al la centjariĝo de eminenta ĉeĥa Esperanto-tradukisto Rudolf Hromada (9.11.1890-1964). La seminarion partoprenis 17 personoj kaj gasto el Aŭstrio.

La vendredan vesperon malfermis rememoroj pri Rudolf Hromada, rakontataj ĉefe de Josef Vondroušek, kiu konis lin persone. Josef Vondroušek (mem bonega tradukisto, precipe de Karel Čapek) emfazis la stilan majstrecon de Rudolf Hromada kaj lian vortosenton, aplikitan en leksikografiaj verkoj. Poste oni rememoris ankoraŭ aliajn ĉeĥajn majstrojn de Esperanto-tradukado: Miloš Lukaš, Tomáš Pumpr kaj Jiri Korinek.

En la dua parto de vendreda programo okazis diskutado pri eldonebloj de E-literaturo. Oni konkludis, ke ekzistas multaj valoraj manuskriptoj, kiujn minacas perdiĝo (multaj jam perdiĝis), tial necesas serĉi manierojn de ilia konservado. En la estonteco esperable oni povos surdiskigi la manuskriptojn per komputilo kaj por ĉiu interesito presi apartan ekzempleron liakoste. Nun necesas uzi pli malmultekostajn manierojn, ekz. ciklostilaparaton, kvankam la ciklostilitaj libroj ne estas tre belaj, tamen ili povas konservi la verkon kaj disponigi ĝin almenaŭ al la plej grandaj interesitoj. Se oni eldonas verkon libroforme, estas pli avantaĝe eldoni komence malgrandan kvanton kaj post disvendo plenumi reeldonon laŭ konservitaj matricoj. Kutime oni sukcesas vendi en unu jaro 300-500 ekzemplerojn; se oni eldonis ekz. 3000 ekzemplerojn, la verko estas vendata 6-10 jarojn kaj la mono estas en ĝi blokita. Se oni eldonus nur 500 ekzemplerojn, post ilia disvendo eblas per reveninta mono eldoni novajn 500 ekzemplerojn ktp. Tiamaniere povas malgranda sumo senĉese utile cirkuli.

La sabatan programon startigis la prezidanto de ĈEA, inĝ. Petr Chrdle, per konciza informo pri la 75-a UK en Havano kaj poste Miroslav Malovec prelegis pri interpretado. Dum tradukisto devas esti homo trankvila, pacienca,

fanatike precizema, kapabla sidi longajn horojn en sia laborĉambro, ĉirkaŭita nur de vortaroj kaj enciklopedioj, interpretado postulas personon societeman, aventuraman, rapide pensantan, kiu ne timas traduki ne tute precize, sed ĉefe rapide kaj klare. Interpretisto servas al la parolantoj kvazaŭ indiferenta tradukmaŝino, tial li devas paroli en la unua persono (Mi bonvenigas vin...), ne en la tria (La sinjoro diras, ke li bonvenigas vin...), li devas rigardi en neŭtralan direkton inter la parolantoj por ne tiri al si iliajn rigardojn (La ĝentileco postulas, ke ili rigardu unu la alian, ne la interpretiston!). La interpretisto ne rajtas prijuĝi, ĉu la diraĵo estas saĝa aŭ stulta, deca aŭ maldeca, li devas ĉion traduki sencenzure; se la aŭskultanto ne komprenis ion kaj postulas klarigon, la interpretisto ne eksplikas mem, sed tradukas la demandon. La interpretisto rajtas fari notojn, precipe ĉe numeraloj kaj propraj nomoj. La parolantoj uzantaj la servojn de interpretisto parolu ne tro rapide kaj ne en longaj kaj komplikaj frazoj. Interpretisto evitu alkoholaĵojn eĉ dum festenoj kaj bankedoj, kiam li interpretas; ĉiam li venu bone vestita (ne en ĵinzoj), ĉar povas okazi oficialaj akceptoj, filmado ktp.

La enkondukan prelegon pri beletra tradukado prezentis poeto Jiri Karen. Li substrekis la signifon de tradukado por Esperanto, por disvolvado de ĝia vortprovizo kaj frazeologio, por ĝia prestiĝo kaj por instruado liverante taŭgan legaĵon. Tradukistojn li subdividas je konsciaj diletantoj, kiuj tradukas nur simplajn, ne tre artismajn tekstojn, plej ofte por amuzaj kaj pedagogiaj celoj, je ambiciaj diletantoj, kiuj klopodas traduki majstroverkojn, sed kiuj ankoraŭ ne posedas kapablojn bezonatajn por plenumi tian taskon, kaj je majstroj, kies tradukoj sukcese esprimas per la rimedoj de Esperanto la kvalitojn de majstroverkoj kaj altigas la prestiĝon de la Internacia Lingvo. Krom talento kaj posedo de Esperanto tradukisto bezonas multajn helpilojn: PIV, PAG, Parnasa Gvidlibro, "6000 frazeologiaj esprimoj", sinonima vortaro, granda vortaro nacilingva-Esperanta, nacilingva vortaro eksplika, ĝenerala enciklopedio, vortaro de

fremdvortoj, lernolibroj pri literatura teorio, pri tradukado, pri versfarado, pri lingvoscienco. Helpas ankaŭ vortaroj de la angla, franca, hispana kaj germana lingvoj, ĉar Esperanto ofte imitas iliajn vortkonstruojn. En Esperanto oni bedaŭrinde ne havas tiom multajn helpilojn, kiom oni bezonus.

Post la tagmanĝo la partoprenantoj refreŝigis sin per promeno en la ĉirkaŭaĵo kaj denove eklaboris. Du semajnojn antaŭ la seminario ili ricevis perpoŝte ĉefan tekston kun fragmentoj el la granda, sed malfacila ĉefverkisto Bohumil Hrabal, kaj nun ili komparis la provojn pri traduko. Ĉar la originala teksto enhavas dialektaĵojn, temis fakte pri demando, kiel traduki tiajn elementojn en Esperanto. Sur la fono de kodigita literatura lingvo ili elvokas etoson de simpatia, bonkora vilaĝa medio. Tial ne eblas uzi ian kripligitan Esperanton, kvazaŭ la vilaĝanoj estus primitivaj, maldecaj stultuloj. Bonan solvon prezentas germana traduko, aperinta en Germanio, kiu ne uzas dialekton; germana dialekto transportus la medion el Moravio al iu germana regiono, kio estus grava tradukeraro. La tradukisto uzis normalan lingvon, tamen iomete spicitan per metaforoj kaj metonimioj. Ankaŭ Esperanto disponigas similajn rimedojn (ekz. spici kaj pipri frazojn, melki monon el iu, deskui bridojn, forlepori ktp.).

La sabata vespero estis dediĉita al moderna poezio. Jiri.Karen klarigis, ke Parnasa Gvidlibro koncernas la klasikan poezion, por kiu en Esperanto estas karakteriza apostrofado de viraj rimoj, dum la moderna poezio, uzanta version kaj ligitan kaj liberan, ne toleras apostrofojn. Poste li diktis al la partoprenantoj unu el siaj ĉefaj poemoj en libera verso kaj donis tempon por tradukadi. La rezultoj estis poste komparitaj kun la traduko de poeto Josef Rumler en la broŝuro "52 poemoj - nuntempaj ĉefaj poetoj en 1000 versoj".

Oni disponigis al la partoprenantoj tempon por diskutado. La temoj estis abundaj: Elektado de tradukindaj verkoj el la nacia literaturo estu reguligata laŭ la internaciaj vidpunktoj, ĉar multaj amataj naciaj verkoj diras nenion al fremduloj. Klopodu havi grandan vortprovizon kaj kultivu kapablon derivadi kaj kunmetadi, kio protektos vin kontraŭ troa neologismemo.

Fine la partoprenantoj interkonsentis, ke oni aranĝu la seminarion regule sub la mallongigo TRASE (tradukseminario). Kelkaj prelegoj kaj aliaj materialoj estis ankaŭ ciklostilitaj.

Miroslav MALOVEC

KURSO POR VOJAĜGVIDANTOJ EN POLLANDO

De la 27-a de januaro ĝis la 10-a de februaro 1991 en pola urbo Bydgoszcz, fama centro de pola E-movado okazis internacia kurso por E-vojaĝgvidantoj. La kurson organizis la turisma agentejo "Esperantotur" - Bydgoszcz, bone konata pro sia agado en la kampo de turismo tra la mondo kaj disvastigo de Esperanto pere de turismo. La kurson partoprenis geesperantistoj el Pollando, el Sovetunio (Ruslando, Ukrainio, Litovio, Dagestano) kaj Bulgario. La vojaĝon kaj restadon de la bulgaroj organizis turisma firmao "Stelotur" - Sofio. La organizantoj de la kurso havis ambician planon dum tiuj du semajnoj lernigi al la partoprenantoj ne nur lertecon pri priservado de turismaj grupoj, sed ankaŭ ĉefajn sciojn pri politika geografio de la mondo, instruadon de Esperanto al komencantoj kaj urĝan medicinan helpon.

Kiel lektoroj kaj prelegantoj partoprenis la reprezentantoj de turismaj Esperanto-agentejoj el Pollando, Benelukso, Hungario, Sovetunio, Bulgario, Ĉinio. La instruata materialo estis vaste ilustrata pere de videofilmoj. Enkadre de la kurso okazis lecionoj pri la ĉefaj reguloj, kiuj karakterizas la instruadon de Esperanto laŭ Cheh-metodo. Oni opinias, ke la vojaĝgvidanto en la turismaj E-agentejoj devas esti krome varbanto de novaj esperantistoj kaj disvastiganto de la lingvo inter turistoj. Fine de la kurso okazis du ekzamenoj.

Menciindas la vere internacia, amika kaj agrabla etoso dum la aranĝo. En Bydgoszcz ni trovis multajn novajn amikojn, sincerajn kaj helpemajn. Ni estis devigataj tranokti en Varsovio pro la nuligo de flugo de aviadkompanio "Balkan". Ĝuste tiam ni havis la okazon eksenti entute la famajn solidarecon, helpemon kaj amikecon de esperantistoj. Akceptis nin en sian hejmon tute nekonata de ni juna E-familio: polino Aleksandra kaj japano Keniĉiro Watanuki, al kiuj ni estas tre dankaj pro ilia gastamo. Mi estis feliĉa sperti la spiritan ligon inter samideanoj kaj konvinkiĝi pri la vereco de la aserto, ke esperantisto ĉiam kaj ĉie en la mondo povas trovi amikojn.

Lilia GEORGIEVA

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

Lastatempe kreskas la intereso de la bulgaraj esperantistoj al detaloj el la vivo agado kaj kreado de la aŭtoro de la Internacia Lingvo. Pro manko de aĉeteblaj libroj pri tiuj temoj en Bulgario la Redakcio derevuo "Bulgara Esperantisto" decidis

ŝtopi tiun vakuon per aperigo de serio de materialoj verkitaj de elstaraj gesamideanoj. Certe tiuj materialoj helpas al la legantoj de la revuo, por ke ili pli aktive kaj sindone agadu por disvastigo kaj praktikado de Esperanto.



Grafikaĵo: N.KONDOV

ZAMENHOF KIEL HOMO

Li estis malaltstatura, kun forta barbo brune-griza kaj frutempe kalva kapo. Ĉiam nigre vestita, li portis pormiopajn, orkadritajn okulvitrojn, kiujn li neniam demetis. Li ne estis oratoro, parolis milde kaj malmulte, kaj, laŭ la maniero de la litovaj judoj, prononcis ŝ preskaŭ kiel s. Li multe fumis, precipe cigaredojn. Jam de ĉirkaŭ la jaro 1900 li suferis je

malforteco de la koro kaj manko de pulso en la piedoj. Tial, kiam liaj enspezoj tion ebligis, li vizitis somere germanajn ban-urbojn: Bad-Reinerz (nun la pola Duszynki) en 1906 kaj 1909, Bad Nauheim en 1907, Bad Kissingen en 1911, Bad Saltzbrunn (nun pola Szczawno) en 1912, Bad Neuenahr en 1913. Li heredis la pedantan ordemon de sia patro kaj nur dank'al tio li povis trovi sin en siaj kalkuloj de eldonisto, de librotenisto kaj de kontraktanto kun Hachette. Absolute senruza en la komercaj aferoj, dolore spertinte la valoron de la mono li tamen neniam cedis al ĝia allogo, plurfoje fiere rifuzis la helpon de sinceraj admirantoj kaj mem ne ŝparis siajn helpojn al malriĉuloj. Li estis timema antaŭ la publiko kaj malinklinis al la oficialaj ceremonioj, kiujn li partoprenis nur pro bono de Esperanto. Nature modesta kaj pacema, li ĉiam pensis mildigi ĉiujn konfliktojn ĉirkaŭ si kaj neniam montris ian resenton kontraŭ liaj ofendintoj. Eĉ al tiuj, kiuj lin plej kruele perfidis, Louis de Beaufront, li ĝis la fino volis helpi kaj skribis por li mirige pardoneman leteron. Li estis unu el tiuj maloftaj homoj, kiuj ludis gravan internacian

rolon, kaj tamen havas nenion por timi el la publikigo de sia korespondajaro: ĝi rivelas nur lian denaskan ĝentilecon, lian profundan sincerecon kaj lian altan senton pri justeco.

Sed plej gravaj trajtoj de lia karaktero estis la volforto, per kiu li ĉion oferis por siaj idealoj kaj la pacienca obstino, per kiu li forpuŝis ĉiujn obstaklojn al ilia efektivigo. Kaj tiun volforton kaj tiun paciencon li ĉerpis el la vere senmezura amo, kiu instigis lin alporti, per ĉiuj fortoj de sia korpo kaj spirito, iom da konsolo al tiu fizike kaj morale blindiginta homaro en plenumado de la antikva orakolo: "Konsolu, konsolu mian popolon!"

LIA KARAKTERO

La juna Zamenhof estis tre inteligenta kaj laborema, ĉiam la unua en siaj klasoj; ĉiuj liaj kamaradoj profetis al li brilajn sukcesojn. Li havis apartan dispozicion por la lingvoj; tri li parolis libere - la rusan, la germanan kaj la polan; tri li legis flue - la latinan, la hebrean kaj la francan - se ne paroli pri la jida aŭ la judgermana, tiam nur parolata jargono, kiun li esploris lingvistike dum du jaroj kaj pri kiu li ellaboris tutan

gramatikon; de la greka, la angla, la itala kaj eble pri kelkaj aliaj li havis nur okazan kaj pli teorian konon; de la litova estas tre dubinde, ĉu li konis pli ol kelkajn konversaciajn frazojn. Sed li ĉiam rigardis la rusan kiel sian hejman lingvon (preskaŭ nur en ĝi kaj en Esperanto li versadis) kaj Litovujon-Litvon li sentis kiel sian patrimon. Tiu poliglotismo estis nur la respegulo de la kondiĉaro, en kiu li vivis, kaj kiu ne povis ne influi sur la penson de tiel sentema adoleskanto, kune kun

la neforviŝebla spuro de la hebrea mistikismo - kaj de la hereda kodo al misia tasko de lia gento. Vivante, ekde la infaneco, meze de popolmiksaĵo, apartenante al raso, kiu, por esprimi sian animon, havis tiam nur la elekton inter jam delonge mortinta lingvo aŭ la malpropra lingvo de ĝiaj subpremantoj, kaj, disigite inter la nacioj, ne povis ĝui la rajtojn de la ceteraj nacioj, edukite laŭ la klerisma principo, ke ĉiuj homoj estas egalrajtaj fratoj, li,

denaska idealisto, kovis obsedan revadon pri unuiĝo de la homaro en harmonia egaleco. Kaj pro lia aparta naturdoto, tiu revo rapide identiĝis kun la revo de universala lingvo, kiu, sennacia kaj neŭtrala, redonus al la judoj la sendependecon kaj ebligus al la homaj grupoj pli facile interkompreniĝi.

Gaston WARINGHIEN

El la libro "1887 kaj la sekvo..."

Ni recenzas

NOVA AGNOSKO DE ESPERANTO

A. I. Koroleviĉ, Libro pri Esperanto (en rusa lingvo), Kiev, Eldonejo de la Akademio de Sciencoj de Ukraina SSR, "Naukova dumka", 1989, 256 p.

La problemoj pri internacia lingvo ĝuas lastatempe specialan atenton de sovetiaj sciencistoj. Oni kreis esplorlaboran grupon pri interlingvistiko en Lingvistika Instituto ĉe Akademio de Sciencoj de Sovetunio, kio bedaŭrinde ne okazis ankoraŭ en Bulgario. Nun la Akademio de Sciencoj de Ukrainio siavice pruvis per la eldono de "Libro pri Esperanto" de A. I. Koroleviĉ sian agnoskon pri la plej disvastigita plan- kaj helplingvo en la mondo. La verko konsistas el antaŭparolo, enkonduko, kvin ĉapitroj, anekso, bibliografio enhavanta 168 titolojn kaj alfabetan indekso. Verŝajne sub la influo de la universaleco de mondlingvo la libro havas enciklopedian karakteron. Ĝi estas samtempe gramatika studo, lernolibro, sociologia esploro, movada historio, lingvistika verko kaj krestomatia.

La antaŭparolo estas verkita de la respondeca redaktoro profesoro doktoro de fiologiaj sciencoj M. I. Isaev, konata figuro en la internacia E-movado.

En la enkonduko A. I. Koroleviĉ faras ĝeneralan skizon de la problemoj pri internacia lingvo kaj prezentas la diversspecajn atingojn de Esperanto. Li substrekas la kontribuon de esperantologiaj disertacioj pri la oficiala agnosko en eŭropaj universitatoj (Berlino, Budapeŝto, Parizo). La aŭtoro ne uzas apologian tonon kaj serĉas la agnoskojn pri Esperanto ekster ties movado.

En la unua ĉapitro A. I. Koroleviĉ prezentas la historian evoluon de la ideo pri internacia lingvo. La titolo de la ĉapitro - "Pri la prahistorio de Esperanto", montras iun egocentrismon. Esperanto anstataŭigas la nocion "ideala internacia helplingvo" (dank' al la konotativa ŝanĝo en sia semantiko pro la granda disvastiĝo), ĉar ne ĉiuj projektoj pri mondlingvoj havis

kontribuon en la kreado de Esperanto (escepte de Volapuko kaj kelkaj aliaj, konataj al Zamenhof). Meritas specialan atenton la esploro de A. I. Koroleviĉ pri la rusaj projektoj de internacia lingvo kaj la aŭtoro konsidero pri la rolo de la slavaj sanktuloj Cirilo kaj Metodio. Laŭ A. I. Koroleviĉ certa nombro da vortoj en la tradukoj de sanktaj libroj, kiujn faris la du fratoj, estas originale kreitaj kaj ne ekzistas en aliaj lingvoj (slavaj aŭ ne). Tamen tiu hipotezo estas malfacile pruvebla. Krom tio la aserto, ke la etnolekto de Cirilo kaj Metodio havas bulgaran-makedonan devenon estas dubinda kaj havas pli da ideologia ol scienca bazon.

La dua ĉapitro skizas la kreon de Esperanto kaj inkluzivas biografiajn elementojn el la vivo de Zamenhof. La tria ĉapitro "Bazoj de Esperanto" prezentas normigan gramatikan priskribon de la Internacia Lingvo en senco de "grammaire descriptive". Ĝi povas esti uzata de bulgaroj.

La sekvanta ĉapitro traktas la E-movadon el internacia kaj nacia vidpunktoj. La parto pri sovetia kaj rusa E-movado estas valora, sed mankas bedaŭrinde informoj pri la fiĝo de tridekaj jaroj, kiam komenciĝis la malfacilaĵoj por sovetiaj esperantistoj. La sesa ĉapitro estas dediĉita al E-literaturo. La suplemento estas lernolibro de Esperanto. En ĝi troviĝas granda kvanto da tekstoj (poezio kaj prozo) tradukitaj en rusan lingvon. Post la poeziaj fragmentoj, kiuj ne estas tradukitaj, sekvas plena vortaro de nekonataj vortoj.

La universala karaktero de la "Libro pri Esperanto" kaj la klareco en la prezento de materialoj faras ĝin utila helpilo en la instruado de Esperanto ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por profesiuloj. La kompleksa alpaŝo al la problemaro de Esperanto en mondskala aspekto donas apartan valoron al ĝi.

Dimităr VESELINOV

KUN FERVORO POR ESPERANTO



La 13-an de februaro k.j. en kunveno de sofia E-kulturdomo per propra programo sin prezentis Esperanto-societo "Stojan Vasilev" - komunumo "Krasno selo", Sofio. La programon enkondukis per mallonga parolo Petrana Lalova, prezidanto de la societo. Sekvis interesaj eroj - oni prelegis, recitis kaj plenumis humuraĵojn. Post la kunveno mi havis eblecon interparoli kun Snejana Kondova, 49-jara aktivulino de E-societo "St. Vasilev" kaj de sofia E-kulturdomo (Dum la kunveno mem sia filo Nikolaj majstre desegnis la portreton de d-ro L.L.Zamenhof.)

- Kiel vi eklernis la Internacian Lingvon?

- Esperanton mi eklernis sub influo de mia patro, kiu aŭtodidakte lernis ĝin en Kjustendil. Li estis ekzemplo por mi kun sia boneco, honesteco kaj bona posedo de la lingvo. Mi memoras, ke li tradukis poeziaĵojn de Ĥristo

Botev kaj recitis ilin. Mi atente aŭskultis kaj en mi ekĝermis la deziro perfektigi en la Internacia Lingvo. Krome ekde mia infanaĝo mi havis emon lerni lingvojn. Do kiel lernantino en gimnazio mi partoprenis en korespondanta E-kurso (1957-1958). Publikiginte mian korespondanonceton en revuo "El popola Ĉinio" mi ricevis leterojn el 13 landoj kaj ekkorespondis kun 65 leteramikoj el Ĉinio, Japanio, Hispanio, Hungario, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Rumanio, USSR k.a. En 1963 mi edziniĝis, ekloĝis en Sofio kaj por 30-jara periodo ĉesis okupiĝi pri Esperanto. Mi finlernis Teknikan Mezlernejon pri Maŝinkonstruado kaj eklaboris en Instituto pri Kaŭĉuko - Sofio, kiel maŝinkonstruisto, kie mi plu laboras.

- Kion vi dividus pri la E-aktivo de vi kaj de via filo Nikolaj?

- Nun li estas 15-jara. De sia 8-jaraĝo Nikolaj elmontris talenton pri pentrokreado (i.a. partoprenis diversajn ekspoziciojn) kaj pri lernado de fremdaj lingvoj. Krom Esperanto li nun lernas foreste la anglan lingvon kaj frekventas francan vesperan lernejon. Nun li estas lernanto en Teknika Mezlernejo pri Maŝinkonstruado, Metalurgio kaj Elektroniko - lia fako estas Teknologio de la Maŝinkonstruado (frida prilaboro).

Mia filo kaj mi en 1989 finis unuagradan kaj duagradan E-kursojn kun lektoro Petrana Lalova. Mi abonis revuojn "Esperanto", "Juna amiko" kaj "Bulgara Esperantisto". Mi regule legas ilin kaj krome por mia propra plezuro mi tradukas

rakontojn publikigitajn en "Bulgara Esperantisto".

- Rakontu pri la agado de Via societo "Stojan Vasilev"?

- En mia E-societo estis organizataj E-kursoj de unua kaj dua gradoj por la membroj. Krome en la societo estas multaj anoj posedantaj diplomojn de tria kaj instrua gradoj. La societo aktive partoprenas la amatoran artaktivadon. Estis kreita grupo de kantantoj, recitantoj kaj plenumantoj de humuraĵoj. Ĝi multfoje prezentis programerojn en solenaj kunvenoj, celebroy kaj gastadoj en sofia E-kulturdomo. Nia societo havas ankaŭ ŝakistan grupon, kiun gvidas majstrino de sporto; ĝi organizas kaj partoprenas ĉiujare en ŝakistaj turniroj en Sofio. Membroj de la societo partoprenis en forstumado de Vitoŝa-monto apud Sofio, kie ili plantis 200 pinidojn kaj kreis "Esperantan arbareton", pri kio oni eĉ komunikis en la radio. Ni partoprenis en Verdaj Patroloj en kv. Dragalevci kaj en Vitoŝa-monto por protektado de naturmedio. La societanoj subtenas korespondligojn kun pli ol 100 esperantistoj el multaj landoj. Ofte ni organizas ekskursojn kaj renkontiĝojn, en kiuj ni pli bone ekkonas unu la alian kaj sentas nin en amika etoso. Pro manko de konvena klubejo en la lastaj monatoj ni kunvenas en apartamentoj.

- Viaj planoj por la estonto?

- Mi havas deziron korespondi kun leteramikoj el Italio, Tanzanio kaj Brazilo, kaj mia filo - el Alĝerio, Pollando kaj Belgio. Krome ni intencas pli aktive partopreni la agadon de nia E-societo kaj de la sofia E-kulturdomo.

Evgeni GEORGIEV

PENSOJ- TRAFINTAJ MIN EN DIVERSA TEMPO

● *Kompatu la egoistojn! Ili estas malfeliĉuloj.*

● *La internaj malamikoj de ĉiu organizo estas pli danĝeraj ol la eksteraj, ĉar ne ĉiam oni povas distingi ilin disde la amikoj kaj ofte oni ne kontraŭagas ilin. La Esperanto-movado sendispute same havas siajn internajn malamikojn.*

● *La soleco prezentas gravan malsaniĝon. Estas homoj, kiuj mem preparas sian solecon en maljuna aĝo.*

● *La plurismo de opinioj kondukas al firma, unuiga starpunkto.*

● *La silentantoj en ĉiu organizo stimulas la herbaĉojn. Ili kontribuas por sufoko de la freŝa penso.*

● *Konstanta unuanimeco montras seriozan malsaniĝon de la organizo.*

● *Mi kritikas nur homojn kapablajn perfektigi. La ceterajn mi senmaskigas.*

● *Plej virta firmigilo de la amikeco estas la sincereco.*

● *La koito estas la plej nobla, plej belemocia, plej homeca aktiveco de la homo, kiu kunigas kaj altenigas la animojn de la geamantoj. Ne insultu, sed benu ĝin!*

● *Sincereco inter amikoj prezentas devigan virton.*

● *Sen sincereco mankas amikeco.*

● *Sen amikeco la vivo prezentas dezerton.*

● *La tempo estas mono, kiu neniam inflaciĝas.*

● *La tempo estas pli ol la mono. Ĝi estas la vivo.*

● *Dum seksumado kuniĝas ne nur la korpoj, kunfluas la animoj de la geamantoj.*

● *La naciismo prezentas la plej reakcian, plej antihumanan fluon en la socioj de ĉiuj tempoj.*

● *Kiam ĉiuj parolas bone pri vi, enrigardu vin por kompreni kie vi eraras.*

● *Ofte homo bezonas malmulton por esti feliĉa. Ni pripensu ĉu ni ne kapablas liveri ĝin al li. Se ni sukcesas, ankaŭ ni eksentus feliĉon.*

● *Sen revoj la vivo prezentus dezerton. En la dezertoj la karavanoj haltas ĉe oazoj. Sen oazoj la vojo estus mortiga. Se mankas oazoj, ni kreu ilin!*

Violin OLJANOV

Juna esperantisto

JUNULARA E-AGADO EN ORIENTA EŬROPO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) havas Landajn Sekciojn, t.e. en 31 landoj en Eŭropo, Afriko, Azio kaj Ameriko kaj 2 fakajn sekciojn - de biciklistoj (BEMI) kaj de naturprotektistoj (KOKO).

Unu el la ĉefaj celoj de TEJO estas teni regulajn kontaktojn kun tiuj landaj kaj fakaj sekcioj. Por revigligi tiujn rilatojn kaj esplori la staton de tiuj Landaj Sekcioj, TEJO lanĉis enketon, kies rezultoj estas jam konataj. La Landaj Sekcioj devis respondi al pluraj demandoj, inter ili pri la takso de la aktuala stato de la agado, pri la atingoj, problemoj, perspektivoj de laboro. Kia estas la situacio en la orient-eŭropaj landoj?

Pri la nuntempa situacio de la pola Landa Sekcio, la reprezentanto de Pola Esperanto-Junularo skribis jenon: "De kelka tempo la aktiveco de Pola Esperanto-Junularo sufiĉe grave stagnas pro diversaj kialoj. Personaj kaŭzoj, movadpolitike naivaj sintenoj de kelkaj tiel nomataj aktivuloj plus pli kaj pli malfavoriĝanta ekonomia situacio rezultigis disfalon de la iamaj sufiĉe bonaj landaj strukturoj. Ankaŭ la generaciŝanĝo lasis malavantaĝajn spurojn. Tamen la nuntempaj junularaj E-medioj en Pollando koncentriĝas al unuopaj regionoj kiel Supra Silezio, Bjalistoko, Szczecin kaj Koszalin. La nombro de la membraro de Pola Esperanto-Junularo estas malstabila kaj kalkuleblas je ĉirkaŭ sescent.

Malfavoraj financaj cirkonstancoj malebligas ankaŭ la kontinuecon de la agado de PSEK, Pola Studenta Esperanto-Komitato. Tiu ĉi organizaĵo ne estas Landa Sekcio de TEJO, sed kun PSEK TEJO havas kunlaborkontakton. Pro tio, ke PSEK ne estas LS de TEJO, mi ĉi tie nun ne donas pliajn sciigojn pri tiu organizaĵo.

La politikaj, ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj en Ĉeĥoslovakio markas ankaŭ la Esperanto-movadon en tiu parto de orienta Eŭropo. Ĉeĥa Esperanto-Junularo ricevis novan estraron, kiu renovigis la asocian

regularon. Rimarkebla estas la vigliĝo de la agado. En la pasinta jaro Ĉeĥa Esperanto-Junularo povis organizi ses internaciajn aranĝojn kaj por tiu ĉi jaro estis planitaj eĉ sep. Krom la internaciaj aranĝoj la ĉeĥaj gejunuloj organizas multajn lokajn renkontiĝojn. Unu el la grandaj bremsiloj estas la burokrataj problemoj, heredaĵo de la stagna tempo, kiu ne povas esti tuj venkita.

La plej grandaj problemoj de la slovakiaj junaj esperantistoj estas la nekontentiga lingvonivelo de la mallarĝa aro de aktivuloj. Desegni perspektivon en la nuna momento dependus de multaj malfacilaj sociaj, ekonomiaj kaj aliaj cirkonstancoj, atentigis la slovaka informanto.

La aktiveco de la hungara Landa Sekcio, de Hungara Esperanto-Junularo same ne plenkontentigas la hungarajn aktivulojn, sed kompare kun aliaj Landaj Sekcioj oni povis konstati, ke ĝi estas bona. En la pasinta tempo estis organizitaj kelkaj signifaj aranĝoj, kiel Internacia Junulara Semajno en la urbo Szödliget. Tiu ĉi aranĝo estas komparebla kun Internacia Seminario en okcidenta Germanio kaj kun Internacia Junulara Festivalo en Italio. La nombro de anoj de Hungara Esperanto-Junularo estis pasintjare ĉirkaŭ 1000. Kiel konate ankaŭ en Hungario okazas gravaj politilkaj ŝanĝoj, kaj ĉiuj estas okupataj pri ili. Multaj junuloj aktiviĝis en la politika vivo kaj ne havas tempon okupiĝi pri aliaj aferoj kiel Esperanto. Estas nun malmultaj agemaj, aktivemaj kaj respondecaj homoj en la junulara medio esperanta en Hungario. La alia kaŭzo de la malaktiveco estas sociaj kaj financaj problemoj de la homoj. Ili devas kromlabori por povi vivi normale. Krome la homoj ŝatus ĝui la avantaĝojn, la eblecojn de Esperanto, partopreni aranĝojn kaj malmulton serioze fari por la movado. Multaj ŝatus uzi Esperanton kiel ripozeblecon kaj ne kiel taskon, respondecan laboron. Alia problemo estas akiri monon de la ŝtato, kiu pli frue subvenciis la Esperanto-movadon. Nun tiuj subvencioj estas draste limigitaj aŭ eĉ tute likvidataj. Tial necesas serĉi aliajn monfontojn.

Tiu ĉi skizo, kiel prezentis ĝin la hungara respondanto al la menciita enketo, laŭ mi estas tre reprezenta por la nuntempa evoluo en la orienteŭropaj landoj. La ekonomiaj problemoj estas - drastaj. Frapas ankaŭ la altegaj membronombroj kontraste al la malaltega nombro de veraj aktivuloj kaj veraj regantoj de la lingvo. Certe vi, karaj geaŭskultantoj, jam spertis la fenomenon en orienta Eŭropo, kiam vi volis

kontakti kun membroj de tiaj Esperantaj amasorganizaĵoj kaj devis konstati, ke li aŭ ŝi malbone aŭ tute ne regas Esperanton. Ofte la homoj membris formale en tiuj Esperanto-asocioj, havantaj neniun imagon pri Esperanto. Per tio la orient-eŭropaj Landaj Asocioj kaj Landaj Sekcioj fanfaronis kaj havis la eblecon delegi la maksimumon de komitatanoj en la Komitato de UEA kaj TEJO, kio povis havi ĝenajn sekvojn okaze de tiklaj voĉdonoj. Nun tiu situacio verŝajne ŝanĝiĝos. Sed la orienteŭropajn Esperanto-asociojn minacas simila stagno, kiel ĝi estas observebla en Esperanto-asocioj ekster Orient-Eŭropo.

Fine estu diritaj kelkaj vortoj pri la bulgara Landa Sekcio, pri Bulgara Esperanto-Junularo. Ankaŭ en Bulgario la politika situacio estas tre vigla. Koncerne Esperanton la plej signifa evento de la pasinta tempo estis la 42a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, kie estis elektita nova estraro kaj kie pli intelektaj kaj pli kleraj homoj, ankaŭ politike pli sendependaj homoj transprenis la remilon. Kiel tio efikas al la junularo, tion oni atendas ankoraŭ.

TEJO havas Landan Sekcion ankaŭ en Jugoslavio. Sed oni devas konsideri Jugoslavian Esperanto-Junularan Asocion kiel surpaperan organizaĵon. Plej aktivaj en Jugoslavio estas la Esperanto-gejunuloj en Zagrebo kaj en aliaj partoj de Kroatio.

En Rumanio, kie nek UEA, nek TEJO havas aligitan asocion, revigliĝas la Esperanto-movado depost la falo de la Ĉauŝesku-diktaturo. En januaro ĉ.j. la rumanoj refondis Rumanian Esperanto-Asocion kaj reaktivigis la Kolektivon Esperanto-Interlingvistiko. La politika evoluo en Rumanio estas necerta kaj la ekonomia stato pli ol katastrofa - kiel ĝenerale en ĉiuj landoj, kie damaĝis la komunisma tragedio. Tial devus esti tre malfacile, seĉ ĉefe materiala organiza helpo de ekstere, rekonstrui la Esperanto-movadon en Rumanio. Ni scias nur, ke en Rumanio vivas multaj parolantoj de nia lingvo.

Ankaŭ en Albanio, por kompletigi la liston, io komenciĝas. Mi mem leterkorespondas kun albana Esperanto-amiko, kiu estas tre entuziasma kaj deziras pliajn kontaktojn kun la ekstera mondo. Kiu volas lian adreson, petu ĝin ĉe nia radio.

Andy KÜNZLI,
Laŭ Svisa Radio Internacia

PRI LA KOLEKTADA HOBIO

La kolektado de poŝtmarkoj, artaj kaj bildkartoj, moneroj, etikedoj de alumetskatoloj, insignoj, medaloj, ordenoj k.a. objektoj ne estas simpla kaj sensignifa okupo por pasigo de la libera tempo.

Kiel ajn estu belaj la poŝtmarkoj, se vi ne ordigas ilin en poŝtmarkalbumo, kolekton vi ne havos. Kolekton el viaj markoj vi havos tiukaze se vi ilin ordigos en difinita sistemo, faciliganta ties studadon: en kiu lando estis presitaj, kiun temon havas. Kolektado - tio signifas studadon en la proceso de la kolektado, iun interesan problemon, fakon de la scienco aŭ de arto.

Là kolektado de poŝtmarkoj, moneroj, poŝtkartoj, etikedoj de alumetskatoloj, insignoj, medaloj, ordenoj k.a. ne estas nur deziro de la homo ekkoni ilin, ties enhavon, la eldonlandojn. Ĉio ĉi donas al la kolektanto detalajn sciigojn, helpas lin riĉigi kaj vastigi sian horizonton.

En tiu ĉi materialo ni donos koncizajn konsilojn al la kolektanto. Verŝajne tio instigos lin serĉi pli riĉan literaturon pri tiu demando.

1. POŜTMARKOJ

Komencante formi kolekton de poŝtmarkoj, oni komencas la kolektadon de poŝtmarkoj el la

*La novan rubrikon "Kolektado" prizorgas Nikola NIKOLOV, ano de nia Redakta Komitato. La legantoj estas petataj sendadi kontribuojn por ties regula aperigo.

tuta mondo. Por la aktive korespondanta esperantisto tio ne estas malfacila tasko. Tio tamen estas tre interesa okupo. La kolektanto ekkonas multajn landojn tra la mondo, ties ŝtatan kaj politikan strukturon, moneran sistemon, iujn historiajn okazintaĵojn. Tamen kolekti ĉiujn markojn aperintajn en la tuta mondo en daŭro de cent kaj pli da jaroj, de kiam ekzistas la poŝtsigno, estas preskaŭ neeble. Komence en ĉiuspeca kolekto estos mankoj, por kies forigo necesas multe da laboro, amo kaj persisto.

Komence, la kolektanto povas turni atenton nur al unu lando aŭ kontinento kaj kolektadi ties markojn. Ekzemple: Finnlando, Japanio, Afriko, Azio aŭ Eŭropo. Valora iĝas tiu kolekto, se en ĝi troviĝas ĉiuj markoj kun ĉiuj nominaloj kaj koloroj, emisiitaj en tiuj landoj en certa tempodaŭro.

Oni povas kolektadi markojn, emisiitajn en diversaj landoj pri unu kaj sama temo. Tiuj kolektoj estas nomataj laŭtemaj. Ekzemple: sporto, urboj, personoj el la scienco kaj arto, historiaj monumentoj, flaŭro kaj faŭno, Esperanto k.a.

Laŭ via plaĉo vi povas kolekti uzitajn aŭ neuzitajn markojn. Antaŭ ol ordigi en la kolekto la uzitajn poŝtmarkojn, oni devas esti degluitaj de la kovertoj. Deglui tiuj poŝtmarkoj estas riska afero. Ĝi povas difektiĝi. Pro tio oni devas eltondi ĝin kun parto de la koverto kaj poste ĝi devas esti trempita en akvo, kiu havas ĉambran

temperaturon. Tie ĝi devas esti ĝis moliĝos kaj degluiĝos de sur la koverto. Oni povas enakvigi aron da markoj. Eligante la poŝtmarkojn el la akvo, oni devas sekigi ilin. Por tiu celo ili estas kuŝigataj sur ĵurnalon. Oni devas kovri la markojn per papero, kiu rapide ensorbas akvon. Post tio necesas, ke oni premu la poŝtmarkojn per libro ĝis plena sekiĝo.

La poŝtmarkojn oni devas preni nur per pinĉilo, por ke ili ne difektiĝu. Ili estas tenataj en albumo. Ĝi estas dividata laŭ temoj kaj landoj.

Multaj filatelistoj kolektas krom markoj, ankaŭ unuataĝajn kovertojn, poŝtstampojn k.a. poŝtaĵojn.

Ĉe la ekzistanta ĉe ni Bulgara Esperanto-Asocio estas Sekcio de la kolektantoj. En la kadro de Universala Esperanto-Asocio aktivas Esperanto-Ligo Filatelista (Amika Rondo de Esperantistoj-Kolektantoj). Ĝi estas fondita en 1968 kaj havas membrojn en 30 landoj. La presorgano de la Ligo nomiĝas "La Verda Lupeo". Ĝi informas pri novaj kaj malnovaj E-filatelaj, instigas kaj helpas partoprenantojn en ekstermovadaj poŝtmarkaj ekspozicioj. Ĉe ELF aktivas Stampobanko, kiu vendas kaj aĉetas senprofite filatelajojn. Ĝis nun aperis pluraj special-katalogoj.

(Daŭrigota)



Deziras korespondi

BENIN

JEAN CODJO (24-jara) - B.P.04, Lokossa (Mono) - kun ĉi pri ĉt.

ABRAHAM MRAKPOR U.S. (24-jara) - Department of Civil Engineering, Faculty of Engineering, Ugbowo Campus, University of Benin, Benin City, Bendel State - pri religio, literaturo, muziko.

BULGARIO

EKATERINA PETROVA (43-jara) - ul. "Hr. Botev" 1, vh. A, ap. 9, v. Mineralni bani 6343, Haskovska obl. - kun ĉi pri ĉt.

HRISTINA ATANASOVA (16-jara lernantino) - ul. "Kapitan Petko Vojvoda" 18, v. Garvanovo, Haskovska obl. - kun ĉi pri ĉt.

VLADIMIR DUNEV - v. Malomir, 8650 Burgaska obl. - kun ĉi pri sporto, muziko, fotado.

ĈEĤOSLOVAKIO

EDIT PARAK (17-jara) - Kamenny most 217, CS-943 58 - kun 17-20 jaraj geesperantistoj el ĉi pri ĉt.

HUNGARIO

BERNADETT KOSECKI (14-jara lernantino) - 3564 Hernadnemeti, Hegyalja ut 26 - kun 13-14 jaraj lernantinoj pri muziko, kolekto bk, pm, kalendaretojn.

POLLANDO

AGATA SOWIRKO (22-jara librotenistino) - PL-76-256 Sycewice 75/1 - kun ĉi pri literaturo, modo kaj historio.

ANDRZEJ SZWANKE (31-jara soldato) - ul. Orzechowa 50/13, 50-540 Wrocław - kun ĉi pri lingvistiko, kolekto monerojn.

JERZY SZCZEPANSKI (27-jara masaĝisto) - PL-34-120 Andrychow, ul. Lenartowicza 14/67

- kun ĉi pri medicino, orienta filozofio, ekologio kaj sporto.

EDMUND GLEBOCKI (44-jara teknikisto) - ul. XXX-Lecia 2/50, 12-100 Szcztytno - kun ĉi pri turismo, kolekto pm, bk.

KARINA BRYLSKA (17-jara) - ul. Rajska 6 m. 19, 87-800 Wloclawek - kun ĉi pri turismo, literaturo, muziko.

SOVETUNIO

LAIMA KAZULIENE (30-jara) - 233009 Litovio, Kaunas, Vijokliu 17 - kun ĉi pri klasika muziko, historio.

LARISA BOGOMAZOVA (18-jara studentino) - SU 656060 Barnaul-60, ul. Jurina, 246-60 - kun ĉi pri lingvoj, vojaĝoj.

TANJA BAŠKIROVA (23-jara) - ul. Ciolkovski 16-76, Šostka, Šumska, 245110 Ukrainio - kun ĉi pri literaturo, muziko, turismo, folkloro.

DITC ALEKS (15-jara) - SU-624488 Volčansk, Sverdlovskaja obl., ul. Krasnoturinskaja 15-15 - kun ĉi pri ĉt.

LJUDMILA HAMETOVA (27-jara instruistino pri germana lingvo) - ul. Gafurova 48/1 kv. 23, SU-734041 Dušanbe - volas havi sinceran amikon, gastigadi unu la alian kaj eble geedziĝi.

KERSTI TILK (16-jara lernantino) - SU-203469, Kaisma, Parnumaa, Estonio - kun ĉi pri ĉt.

TANZANIO

JAYROUSI K. ELIAKIMU (23-jara fraŭlo) - Kirumba Pentecoste Church, Box 83, Mwanza - kun ĉi pri ĉt.

ARON ANTHONY RUPEPO (30-jara komercisto) - St. Stephano Church, P.O.Box 144, Shinyanga - kun ĉi pri ĉt.

ANONCETOJ

Adresojn de firmaoj uzantaj Esperanton en la internaciaj kontaktoj, kaj de ties kunlaborantoj, kolekto grupo "FUTUR".

Kontaktadreso: Ilija
ANDREEV, P. K. 120, 9700
Šumen, Bulgario.

Esperanto-Kulturdomo en urbo Razgrad dum sia kunveno, okazinta en februaro k.j., fondis socian fonduson "Kompato" por socia helpo al membroj de la E-movado el Razgrad kaj el nia lando.

La E-Kulturdomo apartigos ĉiumonate 5 % de siaj enspezoj.

Kiel prezidanto de la fonduso estis elektita d-ro Ivan Kirĉev. Dum la kunveno oni anoncis la unuajn individuajn mondonacojn de esperantistoj.

Kontonumero de la fonduso "Kompato" estas:
185-5-000-274, DSK, u. Razgrad.

"LA ESPERO EL KOREIO" PRI BULGARIO

Ni ricevis revuon "La Espero el Koreio (sept.-okt. 1990), en kiu estas publikigita intervjuo de ties redaktoro Choe Tae-sok kun bulgara esperantistino Fani Miĥajlova. Kiel la aŭtoro mem skribas, lia celo estas "konigi al nia legantaro la aktivan agadon de unu el la fekundaj landoj de E-movado".

Fani Miĥajlova estas multjara aktiva esperantistino, kiu ekde 1974 oficas en BEA. Ŝi koncize skizas la historion de la bulgara E-movado, la prioritatajn sferojn de BEA - kulturo kaj instruado de Esperanto.

Certe la intervjuo kun F. Miĥajlova estos interesa por la korea esperantistaro kaj povus esti utila kaj interesa por la organizado de E-agado en Koreio.

EKAPERIS ROKMUZIKA E-INTERLIGILO

Ni ricevis la unuan numeron de "Rok-Gazet" - unika eldonaĵo en Esperanto pri rok-muziko. Ĝin eldonas Eurokka (Francio) kun celo doni sian kontribuon al la Esperanto-kulturo kaj al la rok-kulturo. Samcelo estas la kreado de eldonejo "Vinilkosmo", kiu povos eldoni multajn aliajn Esperanto-rok-produktaĵojn.


Sur 28 gazetaj paĝoj oni publikigas: recenzon pri la nova kasedo de "Amplifiki "Festoj de Kristnask'" kaj ties tekston; intervjuon kun Ĵomart Amzejev - populara sovetia kantisto; informojn pri la okazinta inter la 4-a kaj la 9-a de julio Internacia Festivalo de E-kulturo en Budapeŝto kaj pri la renkontiĝo de rok-grupoj "Roka ŝtato 90" (2-4.02.1990) en franca urbo Montpeliero. Estas prezentitaj sveda rokbanda "Persone" (ludanta nur originalan materialon kaj kantante ĉiam nur en Esperanto) kaj "Kajto" (el Nederlando), kiu koncertos dum franca turneeto fine de marto/komence de aprilo. Oleg Svirskij el Rubinsk (USSR) rakontas pri la etoso, ĉe kiu ekestis grupo "Kredo".

En la gazeto aperas ankaŭ diversaj anoncetoj, radio-komunikoj, rokmuzika reto k.a.

Por pli da informoj turnu vin al: **C/o Eurokka, Esperanto-Rok-Asocio, F-31450 Donneville, Francio.**

R. GEORGIEVA

Reeldonita prospekto



Faldprospekto "Vieno"
denove eldoniĝis. Ĝi estas
havebla ĉe: **Wiener
Fremdenverkehrsverband,
Obere Augartenstr. 40,
A-1020 Wien, Aŭstrio.**

Kie, kiam, kio

LA PLEJ INTERNACIA...

LINGVO-STUDIO



Internacia Junulara Semajno'91 okazos inter la 1-a kaj 7-a de aŭgusto k.j. en hungara urbo Esztergom (ĉ. 50 000 loĝantoj), kiu situas apud Danubo, je 60 km nordokcidente de Budapeŝto

La programo de IJS'91 estos varia: E-koncertoj, kino- kaj videofilmoj, pluraj konkursoj, ludoj, prelegoj pri la E-movado kaj pri ties perspektivo. Okazos ankaŭ kurseto pri "marketingo", oni pridiskutos la temon: "Orienta Eŭropo: ĉu evoluo, aŭ koloniigo?" Spektaklojn prezentos E-pupteatro el Vraca, Bulgario.

Aliĝilojn kaj pliajn informojn sendas: **Lingvo-Studio, pk. 87, H-1675 Budapest, Hungario.**

TURISMAJ TAGOJ(TUTA)

Esperanto-klubo Zilina - ĈSFR, invitas vin al la 13-aj Turismaj Tagoj okazantaj en la tagoj 03.08-09.08.1991 en Zilina.

El la programo: 1 duontaga kaj 3 tuttagaj piedekskursoj, 1 tuttaga busekskurso, amuzvesperoj, rostado de lardo, diapozitivoj. La partoprenantoj vizitos faman Vratna-valon en nacia parko Mala Fatra, rkaron de Sŭlov-naturezervejojn kaj aliajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo de Zilina. Kontaktadreso: **Esperanto-klubo, poŝtkesto B-152, CS-012 41 Zilina, ĈSFR.**




LA PREMIO

Gajninto de la premio pro ĝusta solvo de Krucvortenigmo, publikigita en n-ro 12/1990 de "BE" estas **Evdokia Nikolova** el **Varna**. Ŝi ricevas la libron "Kantoj de motoroj" de N. Vapcarov

RONDVORTENIGMO

(laŭ la horloĝmontrilo)



1. Rezulto de pilkludo.
2. Legendo.
3. Ero de skeleto.
4. Alkohola trinkaĵo.
5. Izola verda loko meze en la dezerto.
6. Kortobirdo (rad.)
7. Planedo de la Suno (rad.)
8. Nitrogeno (rad.)
9. Streĉa interplektaĵo de du ŝnuroj.
10. Nomo de bela, bonodora floro.
11. Rivero enfluanta en Baltan maron.

Vasil GEORGIEV

Noto de la Redakcio: Viajn solvojn sendu ĝis la 15-a de junio 1991. La rezultoj estos publikigitaj en n-ro 8/91.



SOLVO:

HORIZONTALE: 7. "Mondlingvisto". 12. Albert. 13. Ta. 14. BEK. 16. Ovo. 17. Kino. 18. Satiro. 21. Kola. 22. Upton. 23. Jork. 25. Si. 26. Muz. 28. LEA. 29. UN. 30. Alme. 32. Orgio. 34. Dato. 36. Konduk. 38. Gano. 39. Akt. 40. Tog. 41. NN. 42. Druido. 45. Standardistoj.

VERTIKALE: 1. Korespondanto. 2. ADA. 3. Tibor. 4. Ugro. 5. Mi. 6. Atanas Nikolov. 8. L. L. 9. Nevoj. 10. VT. 11. Stil. 15. KAT. 17. Kokard. 19. Tomato. 20. Inulo. 21. Kreon. 24. Ol. 27. Z.M. 31. Ekkur. 33. Gut. 35. Anna. 37. Otido. 39. Aral. 42. D.D. 43. Di. 44. Ost. 46. N.A.

REĜO KAJ KRITIKISTO

Iu reĝo ŝatis verki rakontojn, kiujn li konsideris tre bonaj. Ĉar li estis reĝo, la homoj, al kiuj li prezentis siajn rakontojn, ĉiam admiris ilin.

Iun tagon li donis iujn el siaj rakontoj al iu filozofo, al kiu ili tute ne plaĉis, kaj li diris al la reĝo, ke la rakontoj estas tre malbonaj. Tio ĉi tamen kolerigis la reĝon, kaj li tuj sendis la filozofon en la malliberejon.

Pasis kelka tempo kaj la reĝo liberigis la filozofon. Semajnon poste la reĝo invitis lin al vespermanĝo. Li prezentis al la filozofo novan rakonton, kiun li ĵus estis verkinta kaj petis lin eldiri sian opinion pri ĝi. La filozofo turnis sin al la soldatoj, kiuj estis starantaj apud la pordo, kaj diris: "Forkonduku min ree en la malliberejon".

El la angla tradukis:

Dimităr HAĜIEV